



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

9

1970

# Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Intervidiĝis kun Ĉiuj Kamaradoj de la Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio

En la 27-a de junio, Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin intervidiĝis kun ĉiuj kamaradoj de la Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kun kamarado Pak Sen Ĉel kiel la estro kaj kamarado Kim Ĝun Rin kiel la vicedestro.

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin varme bonvenigis la koreajn kunbatalantojn venintajn de la fronto de batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj faris tre intiman kaj amikan interparolon kun kamaradoj Pak Sen Ĉel kaj Kim Ĝun Rin. Ĉeestis ankaŭ kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Kang Ŝeng, Li Hiannian, Vu Fahian kaj Kiu Hujzuo.





Prezidanto Maŭ intime manpremas kun kamarado Pak Sen Ĉel dum la intervidiĝo.

Foto farita dum la intervidiĝo





La mitingo de la pekina popolo por memori la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj kondamni la usonan imperiismon pro ĝia perforta okupado de nia Tajvano

# Eterne Vivu la Batala Amikeco inter la Ĉina kaj Korea Popoloj Formita el Sango

Je la 25-a de junio antaŭ 20 jaroj, la usona imperiismo senskrupule lanĉis la agresan militon kontraŭ Koreio kaj post du tagoj, je la 27-a de junio, 1950, ĝi okupis per armitaj fortoj nian sanktan teritorion Tajvan-provincon. Tio estas neindulgebla krimo de la usona imperiismo kontraŭ la korea popolo, la ĉina popolo kaj la aliaj aziaj popoloj, per tio ĝi skribis ekstreme hontindan paĝon en la krima historio de siaj agresoj kontraŭ Azio. Kun senkompara malamo al la usonaj agresantoj, la septcentmilionaj ĉina popolo indigne kondamnas, kune kun la frata korea popolo, ĝian barbaran agreson kontraŭ Koreio kaj nia teritorio Tajvan.

Laŭ invito de la Registaro de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, la 24-an de junio de la kuranta jaro, nia registaro sendis Delegacion de la Ĉina Popola Respubliko, kun Huang Jongŝeng, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista

Partio de Ĉinio kaj estro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiel la estro kaj Li Zuopeng, membro de PB de CK de KPCĈ, vicestro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA kaj politika komisaro de la mara armeo, kiel la vicestro, al Koreio por partopreni aktivadon por memorigi la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj kondamni la usonan imperiismon pro ĝia krimo perforte okupi nian teritorion Tajvan.

La membroj de la delegacio estis Lju Julan, membro de CK de KPCĈ kaj vicestro de la Revolucia Komitato de Hebej-provinco, Fang Ji, alterna membro de CK de KPCĈ kaj estro de la Komitato por Ekonomiaj Rilatoj kun Fremdlandoj, kaj Li Junĉuan, la ĉina ambasadoro al Koreio.

Kaj laŭ invito de nia registaro, je la sama tago, venis al nia lando la Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kun Pak Sen Ĉel, membro de la Konstanta



Komitato de la Politika Komitato de la Centra Komitato de la Korea Labora Partio, vicĉefministro de la Kabineto kaj ministro de eksteraj aferoj de DPRK, kiel la estro kaj Kim Ĝun Rin, alterna membro de PK de CK de KLP kaj sekretario de CK de KLP, kiel la vicestro por partopreni aktivadon de la ĉina popolo por memori la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj kondamni la usonan imperiismon pro ĝia krimo perforte okupi nian teritorion Tajvan.

La membroj de la delegacio estis Han Jik Su, alterna membro de PK de CK de KLP kaj estro de la Ĝenerala Politika Buroo de la Korea Popola Armeo, Jan Hun Sep, membro de CK de KLP kaj ministro de alta eduko, kaj Hen Ĝun Ge, ambasadoro de DPRK al Ĉinio.

Je la 25-a de junio, la ĉina kaj korea popoloj komencis okazigi grandiozajn mitingojn kaj aktivadojn por batali kontraŭ la usona imperiismo.

En tiu tago, cent mil revoluciaj popolanoj kaj komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA de nia ĉefurbo kunvenis en la Pekina Laborista Stadiono por solene celebri la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj indigne kondamni la usonan imperiismon pro ĝia damninda krimo perforte okupi sudan Koreion kaj nian teritorion Tajvan-provinco.

En la mitingo, la armeanoj kaj popolanoj de nia ĉefurbo laŭte kriante sloganojn montris, ke firme responde al la granda batala alvoko de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la sepcentmiliono ĉina popolo unuiĝos kun la popoloj de Koreio, Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso, kun la Palestina kaj aliaj arabaj popoloj, kun la japana popolo, la usona popolo kaj la revoluciaj popoloj de la aliaj landoj de la kvin kontinentoj, kaj batalos kune kun ili ĝis la fino por venki la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn.

La mitingon partoprenis kune kun armeanoj kaj popolanoj de nia ĉefurbo Ĝou Enlaj, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Buroo de la Centra Komitato de KPCĈ kaj ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Kang


Ŝeng, membro de KK de PB de CK de KPCĈ kaj vicĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj, Giang King, Jaŭ Venjuan kaj Je Kjun, membroj de PB de CK de KPCĈ, Li Hiannian, membro de PB de CK de KPCĈ kaj vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Vu Fahian kaj Kiu Hujzuo, membroj de PB de CK de KPCĈ kaj vicestroj de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA, Vang Donghing, alterna membro de PB de CK de KPCĈ, kaj Guo Moĵuo, membro de CK de KPCĈ kaj vicĉefkomitatano de KK de TKPR, kaj aliaj.

La Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio — amikaj delegitoj de la korea popolo el la fronto de batalo kontraŭ la usona imperiismo ĉeestis la mitingon laŭ invito.

Unue kamarado Li Hiannian faris paroladon kaj esprimis altan estimon kaj varman bonvenigon al la koreaj kunbatalantoj, kiuj speciale alvenis por partopreni la mitingon, kaj al la diverslandaj amikoj, kiuj ĉeestis ĝin.

En sia parolado kamarado Li Hiannian varme laŭdis la heroan korean popolon, kiu sub la gvido de la granda gvidanto de la korea popolo Ĉefministro Kim Il Sen akiris grandan venkon en la milito por la liberigo de sia patrolando kaj per tio faris gravan kontribuon al la revolucia batalo de la mondaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj starigis brilan ekzemplon por la subpremataj nacioj kaj popoloj de la tuta mondo en tio, ke **“malforta lando povas venki fortan landon; malgranda lando povas venki grandan landon”**. La korea





*La Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio atingis Pekinon.*

popolo persistas en sia batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la Demokratia Popola Respubliko de Koreio jam fariĝis solida fortikaĵo sur la kontraŭimperiisma fronto en la Oriento. Li esprimis, ke la ĉina popolo firme subtenas la justan batalon de la korea popolo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo kaj por la reunuigo de la patrolando.

Kamarado Li Hiannian indigne kondamnis la usonan imperiismon pro ĝia perforta okupado de nia teritorio Tajvan. Li diris, ke la ĉina popolo jam faris firman decidon laŭ la instruo kaj strategia dispozicio de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj havas plenan memfidon pri venko, ke ni nepre liberigos nian sanktan teritorion Tajvan kaj plenumos la grandan aferon de unuigo de nia patrolando.

Kamarado Li Hiannian varme laŭdis la profundan batalan amikecon inter la ĉina kaj korea popoloj formitan el sango en la komuna batalo kontraŭ la japana imperiismo kaj la usona imperiismo. Li diris, ke la intensigita koluzio inter la usona kaj japana reaktularoj serioze minacas la sekuron de la popoloj de Ĉinio kaj Koreio. Se la uson-japana reaktularo aŭdacos refoje trudi agresan militon al

la ĉina kaj korea popoloj, la ĉina popolo hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj armita per Maŭzedongpenso, same kiel antaŭe, unuiĝos kaj batalos ŝultro-ĉe-ŝultre kun la korea popolo por komplete venki la agresantojn.

Post la parolado de k-do Li Hiannian, la mitingo donacis al la korea delegacio standardon, kiu portas la surskribon: "Vivu la granda amikeco kaj batala unuiĝo formitaj el sango inter la ĉina kaj korea popoloj!"

Kamarado Pak Sen Ĉel faris longan paroladon interpunkciitan per tondraj aplaŭdoj. Li faris retrorigardon al la granda venko akirita de la korea popolo en la milito por liberigo de la patrolando kaj varme laŭdis la profundan batalan amikecon inter la korea kaj ĉina popoloj formitan en la komuna revolucia batalo. Li diris, ke la korea popolo senkompare alte taksas la amikecon kaj unuiĝon de ĝi kun la ĉina popolo kaj klopodas plenenergie por senĉese plifortigi kaj disvolvi la amikecon kaj unuiĝon.

Menciante grandan nombron da faktoj, kamarado Pak Sen Ĉel forte kondamnis la





*La Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko atingis Pjongjangan. (telefoto)*

krimon de la agresema usona imperiismo en ĝia daŭra perforta okupado de suda Koreio kaj la ĉina teritorio Tajvan kaj senĉesa plivastigo de la hindoĉinia milito kaj forte kondamnis la kriman koluzion de la usona kaj japana reakciularoj por plie suriri la vojon de milita agreso kontraŭ Koreio kaj Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj. Kamarado Pak Sen Ĉel diris, ke la korea popolo daŭre faros obstinan batalon, decideme frakosas la intrigajn aktivadojn de la usona imperiismo por lanĉi novan militon, firme defendos la venkajn fruktojn de revolucio, realigos la grandan historian aferon de reunuigo de la patrolando kaj tiamaniere plenumos siajn nacian taskon kaj internacian devon.

Li diris, ke la ĉina popolo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kun la granda gvidanto kamarado Maŭ Zedong kiel la estro kaj lia intima kunbatalanto kamarado Lin Biaŭ kiel la vicestro kondukis la Grandan Proletaran Kulturajn Revolucion kaj nun estas faranta firman batalon por pliapaŝe pligran-

digi la ekonomian forton kaj nacidefendan forton de la lando kaj por la liberigo de Tajvan.

Kamarado Pak Sen Ĉel emfazis, ke certe venkos la afero de la komuna batalo de la korea kaj ĉina popoloj kaj la revoluciaj aziaj popoloj kontraŭ la usona imperiismo kaj certe pereos imperiismo kun la usona imperiismo kiel la ĉefo.

Post sia parolado, kamarado Pak Sen Ĉel donacis standardon al la mitingo en la nomo de la Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio. La standardo portas jenan surskribon: "Vivu la batalaj amikeco kaj unuiĝo formitaj el sango inter la korea kaj ĉina popoloj!"

Ankaŭ reprezentantoj de laboristoj, malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, komandantoj kaj batalantoj de ĈPLA-trupoj garnizonantaj en Pekino, milicanoj, ruĝgvardianoj kaj kulturaj rondoj de la ĉefurbo faris paroladojn unu post alia.



Je la 25-a, 26-a kaj 27-a de junio, ankaŭ la vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj de pli ol dek urboj de nia lando inkluzive de Ŝanhajo, Tiangin, Ŝenjang, Kantono, Ĉang-ĉun kaj Fuĝoŭ okazigis respektive grandiozajn mitingojn kaj indigne kondamnis la damnindajn krimojn de la usona imperiismo.

Pak Sen Ĉel, estro de la Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kaj ĝiaj membroj Jan Hun Sep kaj Hen Ĝun Ge en unu grupo kaj Kim Ĝun Rin, vicestro de la delegacio, kaj ĝia membro Han Ik Su kaj aliaj koreaj honorindaj gastoj en alia grupo speciale veturis akompanate respektive de kamaradoj Li Hiannian kaj Kiu Hujzuo, de Pekino al Ŝanhajo kaj Ŝenjang por partopreni mitingojn kaj kondamni, kune kun la lokaj vastaj amasoj de armeanoj kaj popolanoj, la agresajn krimojn de la usona imperiismo, kaj ili ricevis varman bonvenigon.

Dum vastaj amasoj de niaj armeanoj kaj popolanoj okazigis grandiozajn mitingojn por oponi la usonan imperiismon, la heroa korea popolo disvolvis la aktivadojn de la batala monato kontraŭ la usona imperiismo.


La 25-an de junio, 200,000 laborantaj popolanoj de Pjongjango okazigis sur Placo Kim Il Sen grandiozan mitingon en la "Bataltago por Devigi la Agresan Armeon de la Usona Imperiismo Retiriĝi el Suda Koreio" por memorigi la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio.

La mitingo indigne kondamnis la usonan imperiismon pro ĝiaj damnindaj krimoj perforte okupi sudan Koreion, intensigi militajn provokojn kaj agreson kontraŭ la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, serioze minaci la sekurecon de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kaj obstine bari la reunuiĝon de la suda kaj norda partoj de Koreio. La mitingo forte postulis, ke la usona imperiismo tuj retiru sian agresan armeon el suda Koreio.

Je la 10-a a. t. m., kiam Kim Il Sen, ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de la Korea Labora Partio kaj ĉefministro de la Kabineto de la Demokratia Popola Respubliko

de Koreio, kaj sinjorino Kim Il Sen, Ĉoj Jon Gen, membro de la Konstanta Komitato de la Politika Komitato de la Centra Komitato de KLP kaj prezidanto de la Konstanta Komitato de la Supera Popola Asembleo, Kim Il, membro de KK de PK de CK de KLP kaj la unua vicĉefministro de la Kabineto de Koreio, Kim Kuan Hjup, membro de KK de PK de CK de KLP kaj vicĉefministro de la Kabineto de Koreio, kaj Ĉefgeneralulo Oh Ĝin Vu, membro de PK de CK de KLP kaj estro de la Ĝenerala Stabo de la Korea Popola Armeo, k. a., akompanante Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestron de Kamboĝo kaj prezidanton de la Nacia Unueca Fronto de Kampuĉa, kaj sinjorinon Norodom Sihanuk, Samdek Penn Nouth, prezidanton de la Politika Buroo de CK de NUFK kaj ĉefministron de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo, kaj sinjorinon Penn Nouth, kiuj faras la ŝtatan viziton al Koreio, Huang Jongŝeng, estron de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, kaj Li Zuopeng, vicestron de la delegacio, Tran Huu Duc, estron de la Registara Delegacio de la Vjetnama Demokratia Respubliko, membron de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ministron de la Ĉefministra Oficejo de VDR, Nguyen Van Hieu, estron de la Delegacio de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj specialan delegiton de la Prezidantaro de CK de NFSV kaj PRR de RSV, kaj Sanan Southichak, estron de la Delegacio de la Laosa Patriota Fronto kaj membron de CK de LPF, laŭ invito venintajn al Koreio por partopreni la aktivadojn de la batala monato kontraŭ la usona imperiismo, suriris la prezidantan podion en la korea nacia muziko, la ĉeestantoj pleniĝis de entuziasmo, longe kaj varme ĝojkriis kaj manklakis.

Unue Kim Il, la unua vicĉefministro de Koreio, faris paroladon en la mitingo. Li dankis Ŝtatestron de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk, kaj la ĉinan registaron, la vjetnaman registaron, la Provizoran Revolucionan Registaron de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj la Centran Komitaton de la Laosa Patriota Fronto, kiuj sendis delegaciojn por



*La Mitingo de Nia Ĉefurba Popolo por Memorigi la 20-an Datrevenon de la Patrolanda Liberiga Milito de Koreio kaj Kondamni la Usonan Imperiismon pro Ĝia Perforta Okupo de Nia Tajvan*

partopreni la mitingon, kaj diverslandajn amikajn organizojn pro ilia fortega subteno al la justa afero de la korea popolo batali kontraŭ la usona imperiismo por la memstareco kaj reunuigo de la patrolando.

En sia parolado, li malkaŝis la krimon de la usona imperiismo, kiu perforte okupas sudan Koreion, turnis ĝin en sian kolonion kaj militan agresan bazon kaj fojrefoje faras seriozajn militajn provokojn kontraŭ la Demokratia Popola Respubliko de Koreio.

Kamarado Kim Il forte kondamnis la usonan imperiismon, kiu intrige klopodas fari la japanan militarismon sia "sturma taĉmento" por lanĉo de nova agresiva milito kontraŭ la korea popolo.

Kamarado Kim Il citis en sia parolado vortojn de Ĉefministro Kim Il Sen, la granda gvidanto de la korea popolo: **"Se la malamiko trudos al ni novan militon, tiam la tuta popolo**

**unuanime leviĝos por fari heroan batalon kaj doni pereigan baton al la malamiko, por defendi la grandan socialisman venkan frukton de la norda parto de la respubliko, por akiri plenan liberigon kaj reunuigon de la patrolando kaj defendi la pacon en Azio kaj la mondo."**

Li esprimis, ke en la estonto la korea popolo, same kiel antaŭe, alte tenos la standardon de batalo kontraŭ imperiismo kaj la usona imperiismo, unuiĝos solide kun ĉiuj revoluciaj popoloj de la tuta mondo, precipe kun la popoloj de aziaj revoluciaj landoj, faros kune kun ili potencajn batalojn kontraŭ imperiismo kaj Usono, por forpeli la agresajn armeojn de la usona imperiismo el suda Koreio kaj Tajvan, el Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo kaj komplete enterigi ilin en Azio.

Poste, Samdek Norodom Sihanuk, la ŝtatestro de Kamboĝo, faris paroladon en la mitingo. Li forte kondamnis la usonan imperiismon pro ĝiaj diversaj krimoj en perforta



okupado de suda Koreio kaj, prenante la tri landojn de Hindoĉinio kiel ekzemplon, malkaŝis kaj kondamnis la usonan imperiismon pro ĝiaj krimoj lanĉi agresan militon en Hindoĉinio kaj detruiri la sendependecon, liberon kaj pacon de la tri hindoĉiniaj landoj, en malobservo de la ĝenevaj interkonsentoj.

Samdek Norodom Sihanuk diris, ke la popoloj de la tri landoj de Hindoĉinio tamen jam unuiĝis en unu batala fronto por rezisti kontraŭ la komuna malamiko kaj ke la fina venko de tiu batalo certe apartenos al la khmera, vjetnama kaj laosa popoloj.

En sia parolado en la mitingo, kamarado Huang Jongŝeng varme laŭdis la grandan venkon kiun akiris la heroo popolo kaj heroo popola armeo de Koreio sub la saĝa gvido de sia estimata gvidanto kamarado Kim Il Sen kaj la Korea Labora Partio en la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj en la socialisma ekonomia konstruado kaj la konstruado de nacidefendo.

Kamarado Huang Jongŝeng diris, ke la usona imperiismo ne voluntas ĉesi post sia malvenko: ĝi ne nur daŭre tenas siajn trupojn en suda Koreio kaj intrigas lanĉi novan agresan militon kontraŭ Koreio post la korea armistiko, sed ankaŭ starigas militajn bazojn kaj entreprenas ŝtatrenversojn en diversaj lokoj kaj lanĉis agresajn militojn en Vjetnamio, Laoso, Kamboĝo kaj Mezoriento. Li montris, ke jam reviviĝis la japana militarismo sub la aktiva nutrado de la usona imperiismo. Utiligante la japanan reakciularon kiel sian ĉefan komplikon en agreso kontraŭ Azio, la usona imperiismo nun praktikas la "doktrinon de

Nixon" batali kontraŭ azianoj per azianoj.

En sia parolado, kamarado Huang Jongŝeng citis vortojn el la solena deklaro de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la 20-a de majo: "Nuntempe, en la monda sfero aperas nova alttajo de la batalo kontraŭ la usona imperiismo." Li montris, ke la korea popolo, la popoloj de la tri hindoĉiniaj landoj, la palestina popolo kaj la popoloj de la arabaj landoj heroe rezistas kontraŭ la agreso kaj armita provoko de la usona imperiismo, la revoluciaj bataloj de la mondaj popoloj estas disvolviĝantaj kaj la revolucia situacio estas tre bona.

Kamarado Huang Jongŝeng esprimis, ke la ĉina popolo firme subtenas la justan batalon de la korea popolo, la popoloj de la tri hindoĉiniaj landoj, la palestina popolo, la popoloj

*Kun senkompara malamo kontraŭ la usona imperiismo, ĉefurbaj milicanoj indigne kondamnas la usonan imperiismon pro ĝia barbara agreso kontraŭ Koreio kaj nia teritorio Tajvan.*





de la arabaj landoj kaj la popoloj de Japanio kaj Usono kontraŭ la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, kaj firme subtenas la revoluciajn batalojn de la popoloj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj la ceteraj partoj de la tuta mondo.

Kamarado Huang Jongŝeng diris, ke la batala amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Koreio formita el sango estas bazita sur la proletara internaciismo kaj povas elteni provojn. Li avertis, ke se la usona imperiismo kaj la japana militarismo aŭdacos trudi agresan militon al la popoloj de Ĉinio kaj Koreio, ili certe refoje renkontos frakasan baton kaj rapidigos sian pereon.

Ankaŭ la delegaciaj estroj Tran Huu Duc, Nguyen Van Hieu kaj Sanan Southichak faris paroladojn unu post alia en la mitingo,

en kiuj ili unuanime kondamnis forte la usonan imperiismon pro ĝia agresa krimo kontraŭ Koreio kaj esprimis firman subtenon al la justa batalo de la korea popolo kontraŭ la agreso de la usona imperiismo.

Post la fino de la mitingo okazis grandioza manifestacio.

Por subteni la justan batalon de la ĉina popolo por liberigi la sanktan teritorion de sia patrolando Tajvan, la Popola Komitato de Pjongjango okazigis je la 27-a de junio en la Mansudaj-a Asemblea Halo solenan "mitingon "Por Subteno de la Batalo de la Ĉina Popolo kontraŭ la Usona Imperiismo kaj por la Liberigo de Tajvan". La mitingo forte kondamnis la usonan imperiismon pro ĝia perforta okupado de la ĉina sankta teritorio Tajvan, forte postulis, ke la agresantoj de la usona im-

*La mitingo en Pjongjango en la "Bataltago por Devigi la Agresan Armeon de la Usona Imperiismo Retiriĝi el Suda Koreio" (telefoto)*





*La solena mitingo "Por Subtenio de la Batalo de la Ĉina Popolo kontraŭ la Usona Imperiismo kaj por la Liberigo de Tajvan" okazigita en Pjongjango. (telefoto)*

periismo tuj foriru de Tajvan, kaj firme esprimis, ke la korea popolo pliapaŝe plifortigos la firman unuiĝon kaj batalan amikecon kun la ĉina popolo en la batalo kontraŭ la komuna malamiko la usona imperiismo.

La mitingon ĉeestis ankaŭ la granda gvidanto de la korea popolo Ĉefministro Kim Il Sen.

La mitingon ĉeestis ankaŭ Prezidanto Ĉoj Jon Gen, Vicĉefministro Li Ĝon Ok, Estro de la Ĝenerala Stabo Oh Ĝin Vu, Vicĉefministro Ĉoj Jon Ĝin, Kim Kjun Rjun, prezidanto de la Komitato por Ekonomiaj Rilatoj kun Fremdlandoj de Koreio, kaj respondeculoj de la koncernaj departementoj de la Kabineto kaj sociaj organizoj.

Ĝin ĉeestis laŭ invito ĉiuj kamaradoj de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko.

Ĝin ĉeestis laŭ invito ankaŭ Samdek Norodom Sihanuk, ŝtatestro de Kamboĝo kaj Samdek Penn Nouth, ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo.

La mitingon ĉeestis ankaŭ Tran Huu Duc, estro de la Registara Delegacio de la Vjetnama Demokratia Respubliko, Nguyen Van Hieu, estro de la Delegacio de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj Sanan Souththichak, estro de la Delegacio de la Laosa Patriota Fronto.

Kiam komenciĝis la mitingo, Oh Ĝin Vu, estro de la Ĝenerala Stabo de la Korea Popola Armeo, la unua faris paroladon, en kiu li forte kondamnis la usonajn agresantojn pro ilia perforta okupo de la sankta teritorio de la Ĉina Popola Respubliko Tajvan kaj iliaj senĉesaj agresaj kaj provokaj aktivadoj kontraŭ la ĉina popolo, forte kondamnis la intrigon de la uson-japana reakciularo fabriki "du Ĉiniojn" kaj esprimis firman subtenon al la justa batalo de la ĉina popolo por liberigi Tajvan.

Poste, paroladis Huang Jongŝeng, estro de la ĉina delegacio. Li deklaris denove, ke





*Batalantoj de la Ĉinaj Popolaj Volontuloj kaj la Korea Popola Armeo huraas pro sia komuna venko.*

Tajvan-provinco estas nedisigebla parto de Ĉinio, kaj la ĉina popolo nepre liberigos ĝin. La ĉina popolo firme oponas, ke la usona imperiismo en koluzio kun la japana reakciularo fabrikas “du Ĉiniojn” kaj intrigas krei t. n. “sendependecon de Tajvan” kun la intenco fortranĉi Tajvan de Ĉinio, kio certe ne povos sukcesi. Li diris, ke en la komuna batalo kontraŭ la uson-japana reakciularo, la ĉina popolo, same kiel antaŭe, unuiĝos, interhelpos kaj batalos ŝultro-ĉe-ŝultre kun la frata korea popolo.

En la nomo de la mitingo, Kan Hi Vun, prezidanto de la Popola Komitato de Pjongjango donacis al la ĉina delegacio silkan standardon kun jena surskribo: “Vivu la batalaj amikeco kaj unuiĝo formitaj el sango inter la korea kaj ĉina popoloj!”

Ekde la 25-a de junio, okazis en sinsekvaj tagoj grandaj mitingoj kaj potencaj manifestacioj de la “Tago de Batalo kontraŭ la Usona Imperiismo”, kun kelkaj dekmiloj ĝis pli ol centmilo da partoprenantoj respektive en Ham Hun, Vonsan, Sinujĝu, Sarivon, Ĉongin, Keson k. a. urboj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio.

La 26-an de junio, Ĉefministro Kim Il Sen faris interparoladon kun kamarado Huang Jongŝeng, estro de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, kaj kamarado Li Zuopeng, vicestro de la delegacio, kaj la membroj de la delegacio.

En la 25-a, t. e. unu tagon antaŭe, kamaradoj Ĝoŭ Enlaj kaj Kang Ŝeng faris interparoladon kun la korea delegacio kun kamarado Pak Sen Ĉel kiel la estro kaj kamarado Kim Ĝun Rin kiel la vicestro.

Post partopreno de la aktivadoj de la korea popolo por memorigi la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj kondamni la usonan imperiismon pro ĝia krimo perforte okupi la ĉinan teritorion Tajvan, la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko revenis al Pekino je la 28-a de junio per speciala aviadilo, kun abundaj frataj solidareco kontraŭimperiisma kaj batala amikeco de la korea popolo.

Per la sama aviadilo venis al Pekino ankaŭ la Delegacio de la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, la Delegacio de la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio kaj





*Dum la tagoj de sia batalo kun la korea popolo, la Ĉinaj Popolaj Volontuloj ricevis grandan subtenon kaj koran zorgon de la korea popolo. Jen koreaj popoloj portas por ili tornistrojn.*

la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio kaj la Delegacio de la Laosa Patriota Fronto.

Post partopreno de la aktivadoj de la ĉina popolo por memorigi la 20-an datrevenon de la patrolanda liberiga milito de Koreio kaj

kondamni la usonan imperiismon pro ĝia krimo perforte okupi nian teritorion Tajvan, la Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio forlasis Pekinon per speciala aviadilo kaj reiris al sia patrolando je la 29-a de junio, kun abunda profunda revolucia amikeco de la ĉina popolo al la frata korea popolo.

*Jen plene malkaŝiĝis la papertigra naturo de la usona imperiismo sub forta bato de la ĉina kaj korea popoloj.*



# Kamboĝa Ŝtatestro Samdek

## Norodom Sihanuk

### Vizitis Koreion

Invitite de Kim Il Sen, ŝtatestro kaj ĉefministro de la Kabineto de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, kaj Ĉoj Jon Gen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Supera Popola Asembleo de Koreio, Samdek Norodom Sihanuk, kamboĝa ŝtatestro kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuĉa, faris ŝtatan viziton al la Demokratia Popola Respubliko de Koreio de la 15-a de junio ĝis la 1-a de julio 1970.

Tiuj, kiuj akompanis Samdek Norodom Sihanuk dum la vizito, estis: princino Monique Sihanuk, edzino de Samdek Norodom Sihanuk; Samdek Penn Nouth, prezidanto de la Politika Buroo de la Centra Komitato de NUFK kaj ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo, kaj lia edzino; princo Norodom Yuvaneath, filo de Samdek Norodom Sihanuk; princino Norodom Ket Kanya, onklino de Samdek Norodom Sihanuk; majoro-generalo Duong Sam OI, membro de PB de CK de NUFK kaj ministro de militaj ekipaĵoj kaj armilaro de RRNUK, kaj lia edzino; Ker Meas, ambasadoro de la Reĝlando de Kamboĝo al Ĉinio kaj aliaj.

Posttagmeze de la 15-a de junio, Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk kaj aliaj atingis Pjongjangan per speciala trajno. Ilin varme bonvenigis ĉe la fervoja stacio Kim Il Sen, ĉefministro de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, kaj lia edzino; Ĉoj Jon Gen, prezidanto de la Konstanta Komitato de la Supera Popola Asembleo de Koreio, kaj lia edzino; Kim Il, unua vicĉefministro de la Kabineto; Ĉoj Hen, ministro de nacidefendo; Ĉoj Jon Ĝin kaj Ĝen Ĝun Tek, vicĉefministroj de la Kabineto, kaj Kan Ljan Uk, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Supera Popola Asembleo.

Pak Sen Ĉel, vicĉefministro de la Kabineto kaj ministro de eksteraj aferoj; Kim En Huan, antaŭa ambasadoro de Koreio en Phnom Penh; kaj Ang Kim Khoan, ambasadoro de la Reĝlando de Kamboĝo al Koreio, speciale veturis al la korea landlimo por bonvenigi la kamboĝajn honorindajn gastojn. Kaj Gun Hi Kin, vicministro de eksteraj aferoj, speciale veturis al Pekino por ilin bonvenigi.

Bonveniga ceremonio okazis solene sur la placo de la fervoja stacio de Pjongjango.



*Ĉefministro Kim Il Sen varme manpremas kun Samdek Norodom Sihanuk.*



Vespere de tiu tago, Ĉefministro Kim Il Sen kaj lia edzino donis grandiozan bankedon honore al Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino en la ŝtata vizito al Koreio.

Ĉefministro Kim Il Sen kaj Samdek Norodom Sihanuk faris paroladojn ĉe la bankedo.

Ĉefministro Kim Il Sen diris: La kamboĝa popolo estas nia frato, amiko kaj kunbatalanto, kiu batalas kune kun ni ĉe la sama fronto kontraŭ la komuna malamiko — la usona imperiisma agresanto.

Ĉefministro Kim Il Sen alte taksis ĉiujn ĝustajn paŝojn alprenitajn de Samdek Norodom Sihanuk por frakasi la usonajn agresantojn kaj iliajn lakeojn, alte taksis lian kontraŭ-imperiisman, kontraŭusonan batalspiriton kaj varme gratulis la kamboĝan popolon kaj ĝian nacian liberigan armeon pro iliaj sukcesoj en la batalo. Kim Il Sen esprimis ke la korea popolo ĉiam aktive subtenos la justan batalon de la kamboĝa, vjetnama kaj laosa popoloj kontraŭ la usonaj imperiismaj agresantoj.

En sia parolado Samdek Norodom Sihanuk esprimis dankon al Koreio pro la varma akcepto

kaj alte taksis la simpatian montritan kaj efikan subtenon donitan de Koreio al la kamboĝa popolo. Li diris, ke la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kaj la Ĉina Popola Respubliko estas la suverenaj ŝtatoj, kiuj la unuaj agnoskis la Nacian Unuecan Fronton de Kampuĉea kaj la Reĝlandan Registaron de Nacia Unuiĝo sub ĝia gvido.

Li daŭrigis: Pro tio ĉiam vin dankos ĉiuj khmeraj patriotoj kaj rezistantaj batalantoj, kaj ankaŭ la khmeraj idoj.

Samdek Norodom Sihanuk montris, ke la korea problemo neniom koncernas al usonanoj, UNO aŭ iu alia flanko, sed estas afero apartenanta nur al la unika, necedebla suvereneco de la korea popolo, kaj la unika, laŭleĝa gvidanto de la korea popolo estas Marŝalo Kim Il Sen.

Posttagmeze de la 18-a de junio, la Popola Komitato de Pjongjango okazigis solenan mitingon por varme bonvenigi Ŝtatestron de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk.

Ĉefministro Kim Il Sen, Prezidanto Ĉoj Jon Gen, Unua Vicĉefministro Kim Il, Vicĉefministro Pak Sen Ĉel kaj aliaj ĉeestis la mitingon.

Prezidanto Ĉoj Jon Gen kaj Samdek Norodom Sihanuk faris paroladojn, kiuj senĉese ricevis longdaŭran kaj varman aplaŭdon.

En la nomo de la mitingo, Kan Hi Vun, prezidanto de la Popola Komitato de Pjongjango, donacis al Samdek Norodom Sihanuk silkan standardon kun la vortoj: “Vivu la batalaj amikeco kaj solidareco inter la korea kaj kamboĝa popoloj!”

La mitingo estis plena de atmosfero de varma amikeco kaj batala solidareco de la komenco ĝis la fino.

Je la 25-a de junio, Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk estis invitita ĉeesti la grandan mitingon de la “Bataltago por Devigi la Agresan Armeon de la Usona Imperiismo Retiriĝi el Suda Koreio” okazigita

en Pjongjango kaj faris paroladon en ĝi. Li kondamnis la agreson de la usona imperiismo kontraŭ la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, kaj entuziasme laŭdis la brilajn venkojn gajnitajn de la heroa korea popolo kaj ĝia heroa armeo sub la gvido de Marŝalo Kim Il Sen en rezisto kontraŭ la agresantoj.

Dum sia vizito, Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk kaj liaj akompanantoj vizitis, en akompano de Ĉefministro Kim Il Sen kaj aliaj koreaj gvidantoj, la Ruĝflagan Revolucian Lernejon de Mankindaj, iun maran trupon de la Korea Popola Armeo, la “Ĉonlima” Fabrikon de Gloraj Militinvalidoj por Rezinaj Uzaĵoj, la Korean Artfilman Studion kaj aliajn lokojn. Ĉie, kien la kamboĝaj honorindaj gastoj venis, ili ricevis varman bonvenigon de la koreaj armeo kaj popolo.

*Solena kunveno en Pjongjango por varme bonvenigi la kamboĝajn honorindajn gastojn*







*Koreaj popoloj varme bonvenigas Ŝtatestron de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk.*

Dum la vizito, Samdek Norodom Sihanuk kaj Ĉefministro Kim Il Sen faris plurajn interparolojn. La interparoloj estis farataj en atmosfero de frata amikeco kaj batala solidareco. En la interparoloj, ambaŭ flankoj interŝanĝis opiniojn pri la nuna internacia situacio, precipe pri la problemo de tio ke la usona imperiismo etendis la militan fajron de armita agreso al Kamboĝo kaj la tuta Hinduĉinio kaj tiel kaŭzis ĉiam pli grandan danĝeron de milito al la tuta Azio, pri la problemo de plua-paŝa disvolvo de amika kaj kunlabora rilato inter la korea kaj khmera popoloj, pri la problemo de plifortigo de komuna batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj pri aliaj problemoj prizorgataj de ambaŭ flankoj. Ili atingis kompletan samopiniecon pri ĉiuj diskutitaj problemoj. La du flankoj subskribis la Komunan Deklaron de la Reĝlando de Kamboĝo kaj la Demokratia Popola Respubliko de Koreio je la 30-a de junio en Pjongjango.

Je la 1-a de julio, Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk sukcese plenumis sian ŝtatan viziton al la Demokratia Popola


Respubliko de Koreio kaj forlasis Pjongjangan per speciala trajno kunportante la kontraŭ-imperiisman batalan solidarecon kaj fratan amikecon de la korea popolo al la kamboĝa popolo. Je la 2-a de julio, Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk kaj liaj akompanantoj atingis Pekinon kaj ricevis ĉe la pekina fervoja stacio varman bonvenigon de Ĝou Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko; Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo; Li Hiannian, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de ĈPR; Li Zuopeng kaj Kiu Hujzuo, vicestroj de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA; Guo Moĵuo, vicĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj kaj aliaj.

Kiam Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino akompanataj de Ĉefministro Ĝou Enlaj, kaj Ĉefministro Penn Nouth kaj lia edzino akompanataj de Vicĉefministro Li Hiannian veturis en senkovrilaj aŭtomobiloj al la gastdomo, ili estis varme bonvenigataj de centmiloj da revoluciaj popoloj, kiuj staris ambaŭflanke de la vojo.

# **La Vizito de Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk al Vjetnamio**

Laŭ invito de Ton Duc Thang, prezidanto de la Vjetnama Demokratia Respubliko, Samdek Norodom Sihanuk, kamboĝa ŝtatestro kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kampuĉa, kaj lia edzino faris amikan viziton al la Vjetnama Demokratia Respubliko de la 25-a de majo ĝis la 8-a de junio. La akompanantoj de Samdek Norodom Sihanuk en la vizito estis Samdek Penn Nouth, prezidanto de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Nacia Unueca Fronto de Kampuĉa kaj ĉefministro de la Reĝlanda Registaro de Nacia Unuiĝo, lia edzino kaj aliaj kamboĝaj honorindaj gastoj.





*Je la 27-a de majo, la Delegacio de Batalaj Herooj kaj Bravuloj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio por Ekstermi Usonajn Agresantojn vizitanta la Nordon vizitis Samdek Norodom Sihanuk, kamboĝan ŝtatestron kaj prezidanton de la Nacia Unueca Fronto de Kampuča, kaj aliajn kamboĝajn honorindajn gastojn.*

*Veturante al la placo de la Hanoja Teatro sub la akompano de Ĉefministro Pham Van Dong kaj aliaj, Samdek Norodom Sihanuk kaj aliaj kamboĝaj honorindaj gastoj ricevis bonvenigon de dekmiloj da popolanoj de Hanojo.*











*Samdek Norodom Sihanuk en la mitingo de la hanoja popolo por lin bonvenigi.*

*Samdek Norodom Sihanuk, Samdek Penn Nouth kaj Ĉefministro Pham Van Dong inter hanojaj geknaboj. (foto sube maldekstre)*

*Prezidanto Ton Duc Thang kaj Samdek Norodom Sihanuk subskribas la Komunan Deklaron de Vjetnamio kaj Kamboĝo.*





*Akompanate de kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Kang Ŝeng k.a., honorindaj gastoj de Kamboĝo, Laoso, Vjetnamio k.a. rigardis prezentadon de vjetnama amatora ensemblo vizitanta Ĉinion kaj poste fotiĝis kun la geaktoroj.*

# Kantoj kaj Dancoj de Unuiĝo kaj Batalo

— Pri prezentado farita de la Vjetnama Ensemblo en Pekino

GIN HIU

**K**UN frata batala amikeco de la popolo de la 4-a zono kaj la tuta lando de Vjetnamio, la Amatora Arta Ensemblo de la 4-a Zono de la Vjetnama Demokratia Respubliko — nia intima kunbatalanto venis unuafoje en majo ĉi-jare al nia lando por fari amikan viziton kaj prezentadon.

Tiu ensemblo estas formita el reprezentantoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kiuj estas bonaj en batalo kaj produktado kaj posedas artan talenton. Kun alta revolucia entuziasmo kaj aparta nacia artostilo, ili faris brilan artan prezentadon.

*Ho Chi Minh — la Plej Bela Nomo, Vidante Verdan Arbon Ni Ekmemoras Vin* kaj aliaj programoj vivece esprimis profundan senton de senlima amo kaj senkompara respekto de la vjetnama popolo al ĝia granda gvidanto Prezidanto Ho Chi Minh. Ili laŭdis ke la nomo de Prezidanto Ho estas “nomo de la patrolando”, kaj la voĉo de Prezidanto Ho estas “alvoko de la hejmlando”. Kun profunda sento ili kantis: “La plej bela floro en la ebenejo

Thap Muoi estas lotusfloro, kaj la plej bela nomo en Vjetnamio estas Ho Chi Minh.”

Plenaj de politika entuziasmo, la artaj batalantoj kantis *Ruĝas la Oriento, Marnavigo Dependas de l' Stiristo* kaj aliajn ĉinajn revoluciajn kantojn, varme prikantante la grandan gvidanton de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ kaj tiel plene esprimante la profundan amon de la vjetnama popolo al Prezidanto Maŭ.

Kun arda sento de “kamarado kaj ankaŭ frato”, la kamaradoj de tiu ensemblo prikantis la nerompeblan batalan amikecon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj. *Vjetnamio — Ĉinio, Saluton al la Granda Postfronto, Aklamo al la Sukcesa Lanĉo de la Unua Artefarita Tersatelito de Ĉinio* kaj aliaj plene manifestis la intiman kaj solidan unuiĝon de la du popoloj en batalo. Kun arda patoso niaj vjetnamaj kamaradoj kantis: “De la vjetnamaj tranĉeoj ni venas al nia granda postfronto. Alveninte al la nova Ĉinio, niaj koroj tajde ondiĝas kaj nia batal-



volvo vigliĝas. Ni estas frataj najbaroj kiuj kune dividas la suferojn, dolĉon kaj amaron.” La batala amikeco inter la ĉina kaj vjetnama popoloj estas starigita persone de la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho kaj la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ, plifortigita kaj disvolvita en la longdaŭra batalo kontraŭ nia komuna malamiko, la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. La ĉina popolo ĉiam rigardas la kontraŭusonon naciŝan batalon de la vjetnama popolo kiel sian propran aferon. Ĝuste kiel la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: **“La sepcent-miliona ĉina popolo estas potenca apogilo por la vjetnama popolo, kaj la vasta teritorio de Ĉinio estas fidinda postfronto de la vjetnama popolo.”** Sur la scenejo brave aspektantaj ĉinaj kaj vjetnamaj milicianoj surportas pafilojn, ŝultre-ĉe-ŝultre vige gardostaras sur sia batala posteno. En la akompano de *jŭeĉino*\* plena de nacia koloro, la klarvoĉe kaj adaĝe plenumita virina dueto *Vjetnamio — Ĉinio* plene esprimis la bravan volon de unuiĝo kaj batalo de la ĉina kaj vjetnama popoloj: “Vjetnamio kaj Ĉinio estas en solida unuiĝo; fortaj estas niaj trupoj kune batalantaj kontraŭ malamiko. Nia frata amikeco estas profunda, marŝas ni antaŭen ĉiam kune kaj kantas laŭte pro la komuna venko!”

En la sama punkto post kiam publikiĝis la informa komuniko pri la sukcesa lanĉo de nia unua artefarita tersatelito, kun senkompara ĝojo la artaj batalantoj de tiu ensemblo tuj verkis kaj provludis kantodancon *Aklamo al la Sukcesa Lanĉo de la Unua Artefarita Tersatelito de Ĉinio*, kiu prezentis la varman aklamon de la ĉina kaj vjetnama popoloj ke “naskiĝis la artefarita tersatelito de Ĉinio”, “socialismo estas antaŭenmarŝanta!” Kiam ĝi estis prezentata, la spektatoroj ritme ekaplaŭdis laŭ la muzika melodio sur la scenejo, kunfandiĝis la sentoj de la aktoroj kaj la spektatoroj en plena harmonio, kaj aplaŭdo sonis tra la tuta teatro. Tiu emocia sceno koncentre reliefigis la solidaran unuanimecon kaj la batalan amikecon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj en komuna batalo kontraŭ la malamiko, kaj tiel puŝis la varman kaj nereteneblan senton de la ĉeestantoj al nova alttajo.

La artaj batalantoj entuziasme prikantis la grandan kontraŭusonon naciŝan batalon de la vjetnamaj armeo kaj popolo. La brila arta prezentado figure respegulis heroaĵojn de la heroaj vjetnamaj armeo kaj popolo en la kontraŭusona naciŝa milito, kiuj sekvas la instruon de Prezidanto Ho Chi Minh “**timi nek oferon nek malfacilojn, firme persisti en la rezistmilito kaj forte akceli ĝin por decida batalo kaj decida venko**”, kaj forte esprimis la fir-

man decidon de la heroa vjetnama popolo por konduki la kontraŭusonon naciŝan militon ĝis la fino. La popola kanto-danco *Letero de Onklo Ho Venis al la Insulo Con Co*, kun intensa nacia koloro kaj profunda arta emocia forto, prezentis superban scenon de kuraĝa batalo de la vjetnama popolo por komplete venki la usonajn agresantojn-rabistojn kaj batalakiri sendependecon kaj reunuiĝon de la patrolando. Con Co estas fronta insulo de la nordo de Vjetnamio situanta proksime al la norda latitudo 17°. En pli ol 1,500 sinsekvaj tagnoktoj, la batalantoj sur tiu heroa insulo frakasis pli ol 500 atakojn de aviadiloj kaj militŝipoj de la usonaj piratoj. En la bravaj figuroj de batalantoj de la Popola Armeo, ni vidis la neflekseblan heroan karakteron de la vjetnama popolo; el la indignaj kanonadoj ni aŭdis muĝadon de la vjetnama popolo: “Jankioj, for al via lando!”

*Lavi Vestojn por la Batalantoj Veturigantaj Pramon, Saluton al la Liberiga Armeo! Saluton al la Grandaj Venkoj en Vintro kaj Printempo!*, *La Profunda Amikeco inter la Armeo kaj Popolo* kaj aliaj programoj estas himnoj por popola milito, en kiu la armeo kaj popolo kune batalas kaj venkas. La popola kanto-danco *Lavi Vestojn por la Batalantoj Veturigantaj Pramon* vivece priskribas emocian scenon de amo de la armeo al la popolo kaj subteno de la popolo al la armeo ĉe iu pramejo en Nghe An — la hejmlando de Prezidanto Ho Chi Minh. La usonaj agresantoj meznombro en ĉiu tago ĵetis al tiu pramejo 20 tunojn da bomboj. Per bravaj bataloj la batalantoj de la Popola Armeo garantiis la pramejan komunikon por ke veturiloj senĉese kuru al la fronto; kaj la lokaj popolanoj lavis vestojn kaj portis manĝaĵojn por la batalantoj, garantiante ke la batalantoj povu tagnokte veturigi la pramon survivi. La armeo kaj popolo de la tuta Vjetnamio kiel tiuj de Nghe An vivas en interrilato kvaŝaŭ de akvo kaj fiŝoj, havas komunan sorton kaj formas maron de popola milito por engluti la usonan imperiismon.

La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ montris: **“Nia komuna malamiko estas la usona imperiismo, ni ĉiuj staras sur la sama batalfronto kaj bezonas nin unuigi kaj subteni reciproke.”** La kontraŭusona naciŝa milito de la vjetnama popolo donis ekstreme pezajn batojn al la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj, donis fortan subtenon al la ĉina revolucia batalo kaj faris gravan kontribuon al la monda revolucio.

\*jŭeĉino, ĉina kaj vjetnama plukmuzikilo kun 4 kordoj kaj ronda plata resonkesto el ligno.

# *Rapide Disvolviĝas la Industrioj de Metalurgio, Elektrono kaj Vitrofibro de Ĉinio*

**S**UB la gvido de la ĝenerala linio “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie” kaj la grandaj principoj “sinapogo sur propraj fortoj” kaj “penema lukto en malfaciloj” elmetitaj de Prezidanto Maŭ, rapide disvolviĝas la industrioj de metalurgio, elektrono, vitrofibro k. a. de nia lando.

Enpaŝinte la grandajn sepdekajn jarojn, la vastaj amasoj de laboristoj sur tiuj frontoj levis potencon kaj forton de socialisma revolucia konkurso kun la nobla deziro gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj gajni gloron por la granda socialisma patrolando, tiel ke aperis pli vigla nova situacio en revoluciado kaj produktado.

## **METALURGIA INDUSTRIO**

En pli profunda disvolvado de la socialisma revolucia konkurso, la vastaj amasoj de metalurgiaj laboristoj de nia lando profunde kaj konstante kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de la granda renegato Liu Ŝaŭki, forigis la “sklavecon antaŭ fremdlandanoj” kaj rampismon, kiuj baras la disvolviĝon de la ŝtala industrio de nia lando, decideme efektivigis la grandan principon de Prezidanto Maŭ “sinapogo sur propraj fortoj” kaj “penema luktado en malfaciloj”, kaj produktas pli multan kaj pli bonan ŝtalon por la ŝtato. La metalurgiaj laboristoj de Ŝanhajo sukcesis produkti por

la ŝtato centojn da specoj da altklasaj alojaj materialoj en la unua sezono de la kuranta jaro. La revoluciaj amasoj de la Ŝanhaja Kvina Ŝtala Fabriko kuraĝe rompis la rutinajn regularojn, elhakis novan vojon kaj sukcesis mem projekti kaj fari grandan vakuan rafinan fandforon per materialoj produktitaj de nia lando, kiu superis la avangardan nivelon de la mondo, kaj produktis altklasan alojan ŝtalon de bonega kvalito. De komenco de la kuranta jaro, la produktokvantoj de la ĉefaj produktaĵoj de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio ŝtalo, fero, ŝtalaj materialoj, koakso kaj aglomeraĵo konstante altiĝas. Mallongiĝis la tempo de fandado de ŝtalo, rimarkinde malaltiĝis la konsumo kvanto de materialoj kaj hejtaĵo kaj krome la kompanio sukcesis provprodukti nombron da novaj specoj de ŝtalaj materialoj. Kun la revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj, la laboristoj de la Dua Ŝtala Fabriko de tiu kompanio klopodis ekspluati la latentan forton, kreis la novan teknologion de apliko de oksigeno al martin-fornego, kaj dank’ al tio mallongiĝis la tempo de ŝtalfandado per martin-fornego je duono, nome duobligis la produktokvanton. En la unua sezono de la kuranta jaro, la laboristoj de la Ĉefurba Ferŝtala Kompanio senĉese akiris novajn sukcesojn kaj kreis sian plej altan rekordon en produkto de ŝtalo, fero, ŝtala ŝtupo, ŝtalaj materialoj, koakso kaj fera erco.

En disvolvado de la ferŝtala industrio laŭ la principo “multe, rapide, bone kaj ekonomie”, nia lando plene mobilizis la amasojn, vaste disvolvis amasan





*De la komenco de la kuranta jaro, daŭre kreskas la produktkvanto de la ĉefaj produktaĵoj de la Benhi-a Ferŝtala Kompanio. Jen ĝiaj laboristoj plenenergie laboras antaŭ ŝtalrafina fornego.*

movadon kaj firme efektivigis la principon de **“irado per ambaŭ gamoj”**, nome samtempa disvolvo de grandaj, mezgrandaj kaj malgrandaj entreprenoj kaj samtempa apliko de modernaj kaj indiĝenaj metodoj. En la jaro 1958, aperis miloj da lokaj mezgrandaj kaj malgrandaj ferŝtalaj fabrikoj en diversaj lokoj de nia lando kaj tio ebligis impetan disvolviĝon de la ferŝtala industrio de nia lando. Sed poste, pro la freneza detruado de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, multaj el la mezgrandaj kaj malgrandaj ferŝtalaj fabrikoj estis sufokitaj. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la revoluciaj amasoj de diversaj lokoj de nia lando ĝisfunde likvidis per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso la terurajn krimojn de Liu Ŝaŭki kaj liaj komplicoj en sufoko de la fruktoj de la granda antaŭensalto kaj kun grandegaj revoluciaj aktiveco kaj kreivo levis novan altan tajdon de kreado de mezgrandaj kaj malgrandaj ferŝtalaj entreprenoj per propraj fortoj. Plene utili-

gante la abundajn riĉfontojn de mineraloj en siaj lokoj, ili sukcesis starigi centojn da mezgrandaj kaj malgrandaj ferŝtalaj fabrikoj, el kiuj iuj jam disvolviĝis en malgrandajn sed kompletajn ferŝtalajn kombinumojn. En la daŭro de malpli ol duonjaro, Liaŭning-provinco jam finkonstruis naŭ malgrandajn altfornojn, kiuj jam komencis produkti. En la kuranta jaro, ankaŭ la provincoj Ŝandong, Gianghi, Hejlonggiang, Henan, Ŝanhi kaj aliaj rapide konstruis nombron da malgrandaj altfornoj kaj ili jam produktis bonkvalitan feron. En la regiono de Jantaj de Ŝandong-provinco, oni jam rapide finkonstruis lokan malgrandan kombinumon relative kompletan, kiu uzos lokajn ercojn kaj havas la sistemon de minekspluato, selektado de ercoj, buligo, aglomerado, fandado kaj laminatado. La forta magneta selektilo de ercoj kaj maŝino por kontinua gisado de ŝtalingotoj, kiujn ili mem fabrikis, atingis avangardan nivelon. La vigla disvolviĝo de la lokaj mezgrandaj kaj malgrandaj ferŝtalaj

fabrikoj multe akcelas la disvolviĝon de la ferŝtala industrio de nia lando kaj donas fortan subtenon al la disvolviĝo de la loka industrio kaj agrikulturo.

## ELEKTRONA INDUSTRIO

La laboristoj kaj vastaj revoluciaj amasoj de Pekino, Ŝanhajo, Tiangin k. a. nun disvolvas amasan aktivadon de entrepreno de elektrona industrio kaj forte akcelas la rapidan disvolvon de elektrona industrio de nia lando.

En la lastaj du jaroj, la nombro de pekinaj fabrikoj de elektrona industrio kreskis je unuoblo, la specoj de radiaparatoj kaj mezuriloj pligrandiĝis duoble kaj ties produktokvanto kreskis 11.5-oble. Ankaŭ specoj kaj produktokvanto de duonkondukilaj aparatoj kaj radiaparataj elementoj plimultiĝis je obloj. Kaj en la sama tempo oni sukcesis produkti nombron da novaj produktaĵoj de avangarda nivelo kaj tiamaniere multe plifortigis la fundamenton de nia elektrona industrio. Sekve de la rapida disvolviĝo de nia elektrona industrio, modernaj elektronaj teknikoj estas iom post iom aplikataj de nia ĉefurbo en la industriaj branĉoj de metalurgio, petrolo, maŝinfarado, kemiindustrio, elektro, trafiko, komunikado k. a.

En la aktivado de amasa entrepreno de elektrona industrio de Pekino, la laboristoj kuraĝas pensi kaj kuraĝas agi, rapide mastris la produktajn teknikojn de elektrona industrio konatajn nur de malmultaj homoj en la pasinteco kaj produktis grandan kvanton da bonkvalitaj radiaparataj elementoj kaj duonkondukilaj aparatoj, mezuriloj kaj aliaj ekipaĵoj urĝe bezonataj de la ŝtato. La vastaj amasoj de laboristoj de la Pekina Ĝenerala Vitra Fabriko kaj aliaj fabrikoj sukcese projektis kaj elfaris, laŭ la principo "**multe, rapide, bone kaj ekonomie**", ĉinstilan grandan solkristalan fornon kun avangarda teknika nivelo kaj produktis grandpecan silician materialon necesan por produkto de grandaj siliciaj kontroleblaj rektifiloj kaj tiamaniere faris kontribuon por la pliapaŝa disvolvo de la elektrona industrio de nia lando.

En la batalo de energia disvolvo de elektrona industrio, la diversaj industriaj branĉoj de Ŝanhajo organizis specialajn vicojn por disvolvo de nia elektrona industrio. Laŭ la bezono de la ŝtato, nombro da laboristoj kiuj antaŭe produktis ludilojn, plastaĵojn, metiartaĵojn, vestojn, kestojn k. c., prenis sur sin la novan taskon de fabrikado de transistoroj, elektronaj aparat-elementoj kaj elektronaj

*Laboristinoj de la Hangĝou-a Lagra Fabriko serioze kontrolas la kvaliton de produktitaj lagroj.*





ekipaĵoj. Ekde la pasinta jaro, sole en la branĉo de metiarta industrio jam formiĝis specialaj vicoj de elektrona industrio el pli ol 15 mil laboristoj el pli ol cent fabrikoj.

En la mallonga tempo de kelkaj monatoj, nombro da fabrikoj de Tiangin sukcese produktis multajn duonkondukilajn materialojn kaj aparaterojn, por kies produkto oni antaŭe opiniis, ke necesas bonegaj kondiĉoj. Plirapidiĝis ankaŭ la apliko de elektrona tekniko en la fabrikoj kaj entreprenoj de tiu urbo. La Fabriko de Ladaĵoj en Hangu-distrikto de Tiangin, kiu havas nur 70 laborantojn, kuraĝe elmetis planon de fabrikado de transistoroj per siaj propraj fortoj. Dank' al kolektiva klopodo, en tri monatoj la laboristoj mem faris 47 aparatojn kaj maŝinojn por produkto de transistoroj kaj fundamente finkonstruis produktan linion de siliciaj ebanaj triodaj kernoj.


### VITROFIBRA INDUSTRIO

Post sia fondiĝo, rapide disvolviĝis la vitrofibra industrio de nia lando. Nun ni jam unuapaŝe konstruis memstaran industriaran sistemon por produkto de vitrofibro. Senĉese kreskas la produktokvanto, altiĝas la kvalito kaj multiĝas la specoj kaj specifikoj de vitrofibro.

Vitrofibro estas tre fortika, eltenas altan temperaturon, korodon kaj havas bonan izolpovon. Ĝi estas vaste uzata. Multaj produktaĵoj faritaj el vitrofibro, kiaj vitrofibraj ŝtofo, fadeno, rubando, tubo kaj vitroŝtalaĵoj, ludas tre gravan rolon en industria kaj agrikultura produktado.

La vitrofibra industrio de nia lando startis en la jaro 1958. En la Granda Proletara Kultura Revolucio ĝi akiris pliapaŝan disvolviĝon. Pasintjare, la vitrofibraj produktaĵoj plimultiĝis je pli ol 38 procentoj kompare kun tiu de 1968, kaj je ĉirkaŭ unuoblo kompare kun tiu antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. Tiu de la unua sezono de la kuranta jaro plimultiĝis je 12 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo en la pasinta jaro. La produktaĵoj de nia vitrofibra industrio jam disvolviĝis de unu sola speco en pli ol cent diversaj specoj. Kaj krome, oni kreis kaj aplikis multajn novajn teknikojn kaj teknologiojn de progresinta nivelo kaj malfermis novan vojon por la disvolviĝo de la vitrofibra industrio.

En la pasinteco, sub la influo de la "sklaveco antaŭ fremdlandanoj" de Liu Ŝaŭki, oni uzis multajn ekipaĵojn senkritike laŭ fremdlandaj rutinoj



*Laboristinoj de la Pekina Elektronvalva Fabriko laboras antaŭ la elektrona ekipaĵo farita de ili mem.*

en produkto de vitrofibro, kio ne nur komplikis la produktan procedon sed ankaŭ konsumis grandan kvanton da rara metalo. Nun, eksperimentaj grupoj de triflanka kombiniĝo kun laboristoj kiel la ĉefa parto stariĝis en la vitrofibraj fabrikoj en diversaj lokoj, plene reformis la malmalmodernajn teknologiojn kaj ekipaĵojn sub la helpo de koncernaj sciencaj institutoj kaj efektivigis multajn gravajn teknikajn renovigojn. La vastaj amasoj de laboristoj de la Hangĝoŭ-a Vitra Fabriko multe rompis fremdlandajn rutinajn regulojn kaj sukcesis konstrui en iom pli ol unu jaro la unuan produktan ekipaĵon de nia lando por eltiro de vitrofibro el forno kun avangarda nivelo. Dank' al konstruiĝo de tiu forno, oni ne nur povas ŝpari grandan kvanton da rara metalo kaj vitroglobetan farejon, kies konstruo bezonas pli ol milionon da *yuan*, sed ankaŭ povas apliki avangardajn teknologiojn kia rapidega vitrofibro kaj grandskale pligrandigi produktokvanton kaj rimarkinde plialtigi la kvaliton de vitrofibro.

# Teknika Renovigo en la Pekina Vinilona Fabriko

**K**IAM mi venis en la Pekinan Vinilonan Fabrikon, forte min impresis la gravaj fruktoj de teknika renovigo, prezentitaj antaŭ miaj okuloj.

Estis la viveplenaj laboristoj de vinilono, kiuj sub la direktado de Maŭzedongpenso kuraĝis rompi fremdlandajn rutinajn regularojn en sia praktiko kaj elhakis la propran vojon por la disvolvo de la vinilona industrio de nia patrolando.

La Pekina Vinilona Fabriko estis ekkonstruita en 1963 kaj komencis sian produktadon en 1965. Ĝiaj ĉefaj ekipaĵoj kaj teknologia materialo estas importitaj el kapitalisma lando. Tiutempe, la fremdlanda kapitalisto ripetfoje fanfaronis, ke la ekipaĵoj kaj teknologia materialo estas “unuarangaj en la mondo”. Sed en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de laboristoj serioze praktikis la grandan orientilon de Prezidanto Maŭ **“rompu fremdlandajn rutinajn regularojn kaj iru nian propran vojon por disvolvo de industrio”**, disvolvis amasajn aktivadojn de teknika renovigo, sukcesis fari gravajn teknikajn renovigojn atingintajn aŭ superintajn avangardajn nivelojn de la mondo, dank’ al kio duobligis la produktokvanto de la fabriko, sen pliigo de la ekipaĵoj kaj personaro. Ankaŭ la kvalito de la produktaĵoj superis la nivelon projektitan kaj la konsumakvanto de materialo estas reduktita ĝis sub la projektita normo.

Pensante pri la fabelo de la fremdlanda specialisto pri “unuarangaj ekipaĵoj en la mondo” en siatempo kaj rigardante la gravajn fruktojn akiritajn de la laboristoj en teknika renovigo, mi vidas ke grava estas la demando kian sintenon havi antaŭ fremdlanda teknika sperto, ĉu kritike ĝin transpreni kaj kuraĝe renovigi prenante la kvin-tesencon kaj forĵetante la feĉon, aŭ alpreni ĉion sendistinge, rampante post fremduloj paŝon post paŝo; en tiu demando speguliĝas la batalo inter la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ

kaj la kontraŭrevolucia reviziisma linio de renegato Liu Ŝaŭki.

Pri tiu ĉi demando, la vastaj amasoj de laboristoj havas profundan komprenon el sia propra sperto.

Ĉu la importitaj ekipaĵoj kaj teknologio estas “unuarangaj en la mondo”? Post kiam la fabriko komencis produkti, la laboristoj iom post iom akiris plenan konon pri la ekipaĵoj en sia longtempa produkta praktikado. Tiu kompleto da ekipaĵoj ne estas tiel “avangarda” kaj “perfekta”, kiel iuj fanfaronis; kontraŭe, iuj eroj de ĝi estas konservativaj aŭ postiĝintaj kaj iuj ekipaĵoj estas eĉ tute senutilaj. Tio rezultis el tio, ke la socia sistemo de kapitalisma lando katenas la kreivon de homo. La kapitalistoj celas ĉasadon de profito kaj ekspluatadon, do iliaj ekipaĵoj kaj teknologio nepre servas al ekspluatado. Ekzemple, unu el la aparatoj de tiu kompleto da ekipaĵoj, nome la supervida aparato, servis al la kapitalistoj por registri malfruigon aŭ antaŭtempan forlason de laboristoj. En nia socialisma nova Ĉinio, la laboristoj estas alte konsciencaj en laboro, do tia aparato estas tute senutila. Kaj iuj eroj de tiu kompleto neniam atingis la projektitan normon post la ekfunkcio.

Vidinte la malraciajn kaj postiĝintajn erojn, la laboristoj delonge jam deziris ilin forigi aŭ anstataŭigi ilin per nova teknologio. Sed antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon, kiuj uzurpis parton de la teknika gvidanteco de la fabriko, energie kolportis la reviziismajn varojn de la renegato Liu Ŝaŭki, kiaj “administrado de fabriko per specialistoj” kaj “sklaveco antaŭ fremdlandanoj”, sinapogis sur “specialistoj” en esplorado, mekanike kopiis metodojn el fremdlanda literaturo kaj superstiĉe observis fremdlandajn regularojn. Ili asertis absurde: “Sufiĉas por vi mastri la fremdlandan produktan teknikon de vinilono, por kio do necesas via renovigo? Vere



naivaj iluzioj!” Ili absolute ne kuraĝis tuŝeti la fremdlandajn regulojn, por ne paroli pri permeso al la laboristoj fari ŝanĝeton al la fremdlandaj ekipaĵoj. Tial la novaj proponoj pri teknika renovigo elmetitaj de la laboristoj absolute ne povis esti eksperimentitaj kaj efektivigitaj sub ilia subpremo. La produkto povis nur atingi la projektitan nivelon.


En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laborista klaso vere prenis en siajn manojn la teknikan gvidantecon. La vastaj amasoj ĝisfunde malkaŝis kaj kritikis la reviziisman linion de funkciigo de fabrikoj antaŭenpuŝatan de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj. La revolucia komitato kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedong-penso en tiu fabriko decideme efektivigis la revolucion linion de Prezidanto Maŭ. Post sia fondiĝo, la revolucia komitato metas tre grandan atenton sur tekniko-renovigajn aktivadojn de la laboristoj. Ĝi alvokis al ili, ke ili liberigu siajn pensojn kaj kuraĝu en kreado. Kaj la komitatanoj studis instruojn de Prezidanto Maŭ kune kun la laboristoj: **“Ni ne devas iri la malnovan vojon de aliaj landoj de la mondo en disvolvo de tekniko kaj ram-**

**padi paŝon post paŝo post la aliaj. Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejeble apliki progresintajn teknikojn, por konstrui nian landon en modernan socialisman potencon landon en ne tro longa historia periodo.”** Ĉio ĉi tio plene mobilizis la latentajn saĝon kaj kreemon de la amasoj, kaj rapide disvolvigis amasa aktivado de teknika renovigo.

En tiu movado, junaj vinilonaj laboristoj kreis ankoraŭ pli avangardajn teknologiojn kaj teknikojn por anstataŭi la t. n. teknologiojn kaj teknikojn “unuarangajn en la mondo”. Multaj junaj laboristoj kun aĝo de iom pli ol dudek jaroj, kiuj estis metilernantoj kiam la fabriko komencis sian produktadon, nun jam fariĝis pioniroj en teknika renovigo. La 22-jara maŝinflegisto Vej Dongŝeng ĝuste estas sturmulo en teknika renovigo fame konata en la tuta fabriko.

Kiam Vej Dongŝeng eniris la fabrikon en 1965, li estis nur 17-jara kaj asignita al la streĉ-romp-ŝpin-laborejo kiel maŝinflegisto. En tiu laborejo instaligis la unua kaj dua tirframoj por simetriigi la vinilonajn fibrojn kaj malaltigi la malegalecon de dikeco de ŝpinaĵo; sed ili ofte difektigis kaj

*Angulo de la vinilona laborejo*



malbone influis la kvaliton de la produktaĵoj. Vej Dongŝeng rimarkis en praktikado, ke la ĉefa parto de tirframo frotdefektigas tre rapide kaj sekve estigas kroĉadon de fibroj. Por ŝanĝi tiun staton, la juna laboristo klopodis ĉiamaniere longigi la vivon de la maŝinpecoj, sed ne povis solvi tiun malfacilan problemon. Li ekpensis: "Kial la tirframoj en koton-ŝpinado bone laboras, sed tie ĉi la maŝino efikas tute kontraŭe? Ĉu estas eble ne uzi tirframon?" Kun tiu demando, li foje kaj refoje esploris la tutan teknologian procedon de streĉ-romp-ŝpino. Sed lia aktivado estis rimarkita de iu "aŭtoritatulo". Tiu ĉi riproĉis Vej Dongŝeng, dirante: "Vinilonaj fibroj havas antaŭajn kaj postajn hokojn, kiel oni povas ne uzi tirframojn?" Kaj krome oni energie klopodis konvinki Vej Dongŝeng per la teorioj pri la kohero de fibroj ktp. Sekve de tio, malvarmiĝis la koro de malgranda Vej.

Poste arde flamis la revolucia amasa kritikado, kaj la laboristoj de la vinilona laborejo kritikis la "sklavecon antaŭ fremdlandanoj" kaj "rampismon" antaŭenpuŝitajn de Liu Ŝaŭki kaj malkaŝis malbonan rezulton kaŭzitan de ili; kaj samtempe kun tio, vigle disvolviĝis en la tuta fabriko amasa aktivado de teknika renovigo. Tio multe kuraĝigis malgrandan Vej. En lia cerbo denove aperis la ideo pri forigo de la tirframoj. En iu profunda

nokto, malgranda Vej rapidis en la laboratorion kaj atente esploris la strukturon de vinilona fibro per mikroskopo dum longa tempo, sed li ne trovis la hokojn priparolitajn de la "aŭtoritatulo". En la sekvinta tago, kun plena memfido Vej Dongŝeng oficiale prezentis sian renovigan ideon de forigo de la tirframoj kaj tuj ricevis subtenon de la revolucia komitato de la fabriko. Dank' al kuna penlaborado de malgranda Vej kaj aliaj laboristoj kaj post foj-refoja eksperimentado, fine sukcese stariĝis la nova teknologio. La unua kaj dua tirframoj estis forigitaj, la kvalito de la produktaĵoj rimarkinde altiĝis kaj la rompiĝa procento de fadenoj malaltiĝis je 78 procentoj. La kvalito de la ŝpinaĵoj salte altiĝis de ekster-norma al A-klasa kaj la procedo de streĉ-romp-ŝpino mallongiĝis.

La junaj vinilonaj laboristoj kaj kuraĝas krei novon kaj havas rigoran sciencan sintenon; ili certigis sin pri ĉio per eksperimentoj kaj permesis al si neniom da malseriozeco.

Bona ekzemplo pri tio estas la renovigo de la ujo por vaporigo de koagulilo. En la komenco de 1969, la laboristoj de la sekcio de varmtrakto al ŝpinaĵo de la vinilona laborejo venkis diversajn malfacilojn kaj sukcesis efektiviĝi 62 procentojn de siaj renovigoj, kaj tiam altiĝi la vaporigan kvanton de koagulilo fariĝis ŝlosila ero por pliigi



*Grupo de triflanka kombiniĝo interkonsiliĝas pri laboro.*



la produkton. La revolucia komitato elmetis la postulon de altigo de la vaporiga kvanto de koagulilo al la laboristoj, kiuj respondecas pri ĝi. Unufanke ili komencis fari preparon por eksperimentado pri renovigo, aliflanke ili sendis du laboristojn al koncerna instituto por peti konsilojn. Kun fervora koro, la laboristoj venis al iu instituto peti konsilojn kun modesteco. Sed neatendite la akceptanto diris al ili: “Ja plej moderna en la mondo estas la kompleto de ekipaĵoj en via fabriko! Estas sufiĉe bone, ke vi jam atingis la projektitan nivelon.” Kaj li elportis amason da materialoj por montri al ili, dirante: “Tio ĉi estas el Germanio, tio ĉi el Usono, tio ĉi . . .” Fine li admonis la laboristojn, ke la vaporiga kvanto de koagulilo jam atingis la kulminon kaj plialtigo de ĝi alportos malbonon.

La du junaj laboristoj trovis, dum sia aŭskultado, liajn vortojn pli kaj pli malplaĉaj, ili sentis kvazaŭ malvarma akvo verŝiĝis sur ilin. Ili pensis: Kial ni devas kontentiĝi je atingo de fremdlanda “avangarda nivelo”? Kial ni ne povas superi ĝin? Ĉu la vaporiga kvanto de koagulilo vere jam atingis la “kulminon”? Serio da demandoj kirlis ilian penson. Ili refoje studis la instruojn de Prezidanto Maŭ, kiaj **“forigu superstiĉon kaj liberigu penson”** kaj **“eltrovi veron tra praktiko, denove tra praktiko pruvi kaj disvolvi veron”**, ili tuj trovis por si direkton kaj decidis serĉi metodon por altigi la vaporigan kvanton de koagulilo en praktikado.

La ekipaĵoj por vaporigado sub aŭtomata kontrolado de aparatoj en trietaĝa domo estas rigardataj de fremdlandaj kapitalistoj kiel fierindaĵo inter la ekipaĵoj por vinilona fabrikado. Por altigi la vaporigan kvanton de koagulilo, la du junaj laboristoj praktikis tie. En tiu ejo kun altprema vaporo de 40° C, ili laboradis tagnokte super eksperimentoj apud la maŝinoj kaj faris ripetadan observadon, analizadon, statistikadon kaj resumadon.

Ankaŭ la revolucia komitato energie subtenis ilin kaj organizis kadrojn kaj teknikistojn por fari eksperimentadon kune kun ili. Post penlaborado dum tri monatoj, finfine ili rompis la limigon en fremdlanda literaturo, trovis la leĝon en tiu procedo, ŝanĝis la teknologion, altigis la vaporigan kvanton de koagulilo kaj kontentigis la bezonon de grand-skala altigo de la produkto de ŝpinaĵo. Tiuj junaj sturmuloj pretigis la sciencajn donitaĵojn por kreo de la teknologio.

En la fabriko formiĝis la moro persisti en eksperimentado por fari ĉion. Por altigi la kvaliton



*Vej Dongšeng, lertulo en teknika renovigo*

de vinilona fibro, ili kaptis la ĉefan kontraŭdiron — fari esploradon komencante de la fortikeco. Ili faris detalan statistikon laŭ la produktaj tabeloj en la periodo de aŭgusto, 1965, kiam la fabriko komencis produkti, ĝis januaro de 1969, faris komparadon pri la teknologiaj reformoj, analizis la ŝanĝigon de la atingitaj kvalitoj . . . kaj desegnis diagramon.

Kiam ili mezuris la fortikecon de vinilona fibro, ili agis sen ajna neglektemo. Por akiri sciencajn donitaĵojn, ili mezuris pli ol dek mil vinilonajn fibrojn. La fibro dikas nur je sepono de haro, sed kun obstina persistemo ili mezuris unu fibron post alia, ĝis kiam ili akiris centojn da donitaĵoj. Oni povas imagi al si, kiel teda estis la laboro por la junuloj, dum kiu ili devis atenteme ripetadi la saman movon kun zorgemo. Tamen la junuloj plenumis ĝin tre serioze. Ili diris: “Oni devas kaj forigi superstiĉojn kaj observi la sciencajn leĝojn; ju pli grand-skala estas la teknika renovigo, des pli solida devas esti nia laboro. Sukcesojn oni povas atingi nur per peniga laboro.”

Kvankam granda sukceso jam estas atingita en la teknika renovigo de la Pekina Vinilona Fabriko, la vastaj amasoj de ĝiaj laboristoj tamen ne kontentigis pri tio. Ili firme decidis daŭrigi sian klopodadon kaj fari novan kontribuon por la disvolvo de nia vinilona produktado.

# Tutkore kaj Tutanime

## Servi al la Popolo

**E**N la socialisma Ĉinio ia ajn revolucia laboro same estas servi al la popolo. Servaj profesioj kiuj estis malestimataj de la ekspluataj klasoj en la malnova socio fariĝis konsistaj partoj de la tuta revolucia afero en la nova Ĉinio. Laborantoj de servaj profesioj liberiĝis en la politiko kaj fariĝis mastroj de la ŝtato. Kun la brilaj “tri popularaj artikoloj” de Prezidanto Maŭ kiel maksimumo ili konstante akcelas sian ideologian revoluciigon, altigas la memkonscion en servo al la popolo kaj klopodas esti servantoj de la popolo. Sube ni skribas pri bona konduto de laborantoj de la 14-a linio de la Pekina Popola Aŭtobuso kiuj vive studas kaj vive aplikas la “tri popularajn artikolojn” kaj tutkore kaj tutanime servas al la popolo.

La aŭtobusoj de la 14-a linio veturas inter Jongding-pordego kaj la Norda Antaŭurba Bazaro kaj transportas ĉiutage pli ol 40,000 homfojojn. La laborantoj fervore servas al la veturantoj kaj ricevas unuvoĉan laŭdon.

La laborantoj de la 14-a linio servas al la popolo senkondiĉe. En la laboro, ili ofte renkontas eksterordinarajn kazojn. Kiel trakti? Ili serĉas respondojn el la “tri popularaj artikoloj”.

Iun profundan nokton, kiam la plej malfrua aŭtobuso de la 14-a linio atingis iun stacion, la kondukto rimarkis ke alrapidas iu homo por atingi la aŭton, sed inter la stacio kaj alkuranto estas sufiĉe longa distanco. Atendi la alkuranton certe prokrastos la ĝustatempan revenon de la aŭto. Ĉu lin atendi aŭ ne? En tiu momento, li ekmemoris la grandan instruon de Prezidanto Maŭ pri senrezerva servo al la popolo kaj pensis, ke nia laboro estas ja servi al la popolo. Li decidis atendi la alkuranton por ke li povu veturi per la aŭtobuso.

Por pli efike servi al la popolo, ŝoforoj kaj kondukto de la 14-a linio vizitis pli ol 30 fabrikojn kaj entreprenojn ĉe sia linio. Membro de la ko-

*Purigado*





mitato de la partia filio persone venis en aŭtojn por modeste aŭskulti postulojn, opiniojn kaj kritikojn de veturantoj por konstante plibonigi sian servon.

Ili malfruigis la tempon de reveno de la lasta aŭtobuso laŭ deĵortempoj de laboristoj. Por ke ĉiu laboristo kiu laboras en meza deĵoro povu ĝustatempe hejmenveni per la lasta aŭtobuso, la ŝoforo kaj kondukto interkonsentis kun la mezdeĵoraj laboristoj, ke la aŭtobuso atendos ĝis ĉiuj venos kaj haltos laŭ ilia peto; tiamaniere ili donis al laboristoj de multaj fabrikoj oportunon. Iun vesperon aŭtobuso de la 14-a linio venis al la stacio de Mati-strateto kaj mezdeĵoraj laboristoj de la Pekina Sesa Plasta Fabriko eniris la aŭton unu post alia. Iu el ili diris: "Kamarado ŝoforo, ĉiuj venis." La ŝoforo rigardis ĉiujn kaj diris: "Ankoraŭ unu ne venis." La laboristoj rigardis unu alian, sed ne sciis, kiu ne venis, kaj iuj urĝigis: "Ja ĉiuj venis, iru!" La ŝoforo pensis, ke la kamarado kiu ankoraŭ ne venis, certe ne finis sian laboron. Se la aŭto ne atendos lin, tiu devos piediri al sia hejmo, kaj tio influos lian ripozon kaj lian morgaŭan laboron. Li veturigis la aŭton rekte al la fino de la strateto, kie sidas la fabriko, kaj fajfis. Efektive kuris el la strateto la laboristo. Ĉiuj mire interparolis: "Ĉiutage ni veturas kun li per la sama aŭto, sed hodiaŭ neniŭ el ni sciis, kiu ne venis. Tamen kamarado ŝoforo klare scias. Vidu, kia komplezemo al kamaradoj!"

Lastatempe, por respondi la bezonon de la revolucio kaj produkto de la fabrikoj, la ekspedistoj de la 14-a linio iniciate konsiliĝis kun la fabrikoj ĉe la linio por ĉiurimede doni oportunon al ili.

Iufoje, laboristoj de la Pekina Ludila Fabriko estis partoprenontaj kunvenon en la Ĉefurba Kinejo, sed inter la fabriko kaj kinejo estas longa vojo. Por ĝustatempe okazigi kunvenon, la fabrika revolucia komitato decidis fini deĵoron antaŭtempe. Kiam ekspedisto sciigis pri tio, li iniciate sciigis al la fabriko, ke la laboristoj ne finu deĵoron antaŭtempe



*Propagando de Maŭzedongpenso al la veturantoj*

kaj certigis, ke ili ĝustatempe portos la laboristojn al la kunveno. Pro ilia ago konsideri unue la tuton ilin varme laŭdis la revolucia komitato kaj laboristoj de la fabriko.

En novembro de la pasinta jaro, la vojo de He-ping-pordego ĝis Liubukoŭ estis netraversebla pro riparo. La aŭtobusoj de la 14-a linio ĉesis veturi sur tiu ĉi parto de la linio. Kaj pli ol mil homoj, kiuj veturis laŭ tiu ĉi linio, devis veturi per aŭtobusoj de aliaj linioj kaj pro multaj ŝanĝoj de linioj ili malŝparis minimume duonhoron. Disvolvante la spiriton de senrezerva kaj kompleta servo al la popolo la laborantoj de la 14-a linio klopodis ĉiurimede solvi malfacilojn por veturantoj. Ili vizitis multajn unuojn ĉe la linio, kaj en malpli ol duono da monato ŝanĝis trifoje la veturan linion, efektiviĝis ĉirkaŭveturadon kaj per tio garantiis la glatan veturadon de la tuta linio okaze de vojriparo.

Al maljunuloj, malfortuloj, malsanuloj, invalidoj kaj gravedaj virinoj, la ŝoforoj kaj konduktoj de la 14-a linio varme donas komplezon kaj helpon. Kiam ili trovis veturanton malfacila en piedrado, ili pridemandas lian celokon kaj petinte konsenton de la tuta veturanto en la aŭto, haltigas la veturilon ĉe oportuna punkto kaj helpas lin elaŭtiĝi. Iufoje, blinda maljunulo veturis per aŭtobuso de la 14-a linio. Kondukto Su Juhua alpaŝis kaj sciigis post demando, ke tiu iras al la Norda Antaŭurba Bazararo por tie ekveturi per longdistanca aŭtobuso. Kiam la aŭto atingis la finan stacion de la Norda Antaŭurba Bazararo, Su Juhua helpis la maljunulon eliri la aŭton kaj akompanis lin rekte ĝis la atendejo de la starta stacio de la longdistanca aŭtobuso subtenante lin sub la brako. Kiam ŝi rimarkis longan vicon da veturantoj aĉetantaj biletojn, ŝi pensis, ke estas malfacile por la blindulo aĉeti biletan, do aĉetis biletan por li kaj konfidis la maljunulon al samvojano soldato de ĈPLA. La maljunulo dankis ŝin emociite: "Vi ja estas popola servanto instruita de Prezidanto Maŭ!"

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ "ĉiuj en la revoluciaj vicoj devas zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian", la laborantoj de la 14-a linio disvolvas la klasan amon, pensas kion pensas la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, prizorgas kion ili bezonas, kaj ĵuras esti intimuloj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Iun tagon, pluvegis, kaj malvarmetis la vetero. Iu virino surpaŝis la aŭtobuson kun bebo en la sino. Por ke la bebo ne malvarmumiĝu, kondukto Song Juĝen tuj demetis sian supveston kaj kovris ĝin. La virino tre dankis pro tio. Aliffoje, kondukto Vang Hiuĝong rimarkis monujon kiun perdis aĉetisto de la manĝejo de la Pekina Fabriko de Brodkasta Materialo. Ŝi pensis, ke la perdinto certe estas maltrankvilega! Uzante kelkajn minutojn de halto ĉe stacio, ŝi rapide kuris al la fabriko kaj redonis la monujon al la perdinto. La aĉetisto emociite diris al ŝi: "Dankon al vi, kamaradino! Via spirito ĉiam agi laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ estas lerninda por mi."

*Ili kolektas opiniojn en iu fabriko.*





# Prosperas la Pekina Merkato

En la merkato de nia ĉefurbo regas vigloplena prospero.

Ĉu en grandaj magazenoj aŭ en bazaroj, ĉu en ĉionvendejoj aŭ flankmanĝajaj butikoj dislokitaj en fabrikaj kaj minejaj areoj kaj loĝkvartaloj, ĉie sur bretoj abundas variaj industriaj produktaĵoj por ĉiutaga uzo kaj flankmanĝaĵoj. Ŝtofoj, drapoj, vestaĵoj, ŝuoj, ŝtrumpoj, kemifibraj teksaĵoj, kotontrikotoj, bicikloj, kaseroloj el aluminio, termosoj, emajlitaĵoj k. a. ĉiuj plene kontentigas la bezonojn de la laboranta popolo. Kun altiĝo de la aĉetpovo de la popolo, ĉijare la vendkvanto de la radioriceviloj, ledŝuoj, drapoj, brakhorloĝoj, kudromaŝinoj, transistoraj radioriceviloj k. a. varoj en la unua jarkvarono respek-

tive kreskis je pli ol 20% ĝis 100% kompare kun tiu en la sama periodo de la pasinta jaro.

En Pekino la stokoj de grenoj, kotono kaj oleoj estas sufiĉegaj por garantii la provizadon de la urbanoj. Abundaj kaj multspecaj estas flankmanĝaĵoj kiaj porkaĵo, ovoj, kokoj, anasoj, fiŝoj, vinoj, legomoj kaj diversaj fruktoj: pomoj, piroj, sukerkanoj, oranĝoj ktp.


La vigla prospero de Pekino spegulas la rapidan disvolviĝon de la industriaj kaj agrikulturaj produktadoj de la ĉefurbo de post la Liberiĝo, kaj pruvis la senkomparan ĝustecon de la granda orientilo de Prezidanto Maŭ "disvolvi la ekonomion kaj garantii la provizadon".

Magazeno en prospero





Varikoloraj ŝtofoj estas tre bonvenaj al klientoj.



La famkonataj pekinaj rostitaj anasoj



Angulo de flankmanĝaĵa vendejo en la Dongfeng-bazaro






Novaj specoj de vekhorloĝoj



Klientoj aĉetantaj biciklojn



Klientoj aĉetantaj emajlitaĵojn



Fruktovendejo

Freŝaj porkaĵoj atendantaj klientojn



Komunumanoj de popola komunumo de pekina ĉirkaŭurbo portas freŝajn legomojn al la bazaro.





# Superba Himno al Popola Milito

—Pri la fortepiana koncêrto *La Flava Rivero*

**S**UB la brilo de la proletara literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj sub la persona direktado de kamaradino Giang King, la nova speco de proletara literaturo kaj arto — fortepiana koncêrto *La Flava Rivero* ascendis la scenejon de socialisma literaturo kaj arto kun potenca forto.

La fortepiana koncêrto *La Flava Rivero* estas grandtipa revolucia muzika verko por instrumentoj, kreita kun la ĉefaj melodioj de la ĥoraĵo *La Flava Rivero* verkita de la revolucia muzikisto de nia lando kamarado Hian Hinghaj kiel kruda materialo. Kun popola milito kiel sia temo kaj kombino de revolucia realismo kaj revolucia romantiko kiel sia krea principo, ĝi arde prikantas la gigantecon de la ĉina nacio kaj la gloran batalan historion de la ĉina popolo, la grandan venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito persone gvidata de Prezidanto Maŭ kaj la grandan venkon de la penso de Prezidanto Maŭ pri popola milito.

La tuta verko konsistas el kvar partoj, nome “Kanto de la Ŝipistoj sur la Flava Rivero”, “Himno al la Flava Rivero”, “Indigno de la Flava Rivero” kaj “Defendo de la Flava Rivero”. Kun la lasta parto kiel la gravita centro kaj kulmino, tiuj kvar partoj formas potencon tuton, kiu sukcese prezentas jenan grandan temon: **“Ni, la ĉina nacio, havas la spiriton sange batali kontraŭ la malamiko ĝis la fino, la firman decidemon por reakiri niajn perditajn teritorion kaj nacian honoron sur la bazo de nia propra penado, kaj la kapablon memstari inter la nacioj de la mondo.”**

Tuj je la komenco de la preludo de la verko “Kanto de la Ŝipistoj sur la Flava Rivero”, la orkestro prezentas antaŭ la aŭskultantoj grandiozan scenon de furioze ondanta torento de la Flava Rivero en muĝanta vento, per tondra rulado de tamburado kaj potencega muziko. La fortepiano

prezentas ondegojn post ondegoj per hastaj arpeĝoj kaj enkondukas per tio firman kaj fortan labor-kanton de ŝipistoj, kiuj obstine luktas unuanime kun la furiozaj vento kaj ondegoj sur la Flava Rivero. Kun la intensiĝo de la luktado, senĉese disvolviĝas la muziko, dume la pianisto kun arda revolucia patoso vivece priskribas la superban scenon de luktado de ŝipistoj kun rapidega torento por ĝin trapasi, plene aplikante la riĉan esprimivon de sia instrumento. Ĉu tiu muzika bildo prezentas nur la luktadon de la ŝipistoj sur la Flava Rivero kontraŭ vento kaj ondoj? Ne. Ĝi simbolas la obstinegan batalan spiriton de la ĉina nacio, kun kiu la proletaro kaj revolucia popolo de Ĉinio, sub la gvido de la granda stiristo Prezidanto Maŭ, remadas la revolucian ŝipon tra la ventego kaj ondegoj de la epoko, venkante malfacilaĵojn kaj obstaklojn kaj ĉirkaŭirante malprofundejojn kaj rifojn kaj brave antaŭenpuŝiĝas al la transa bordo de venko. Aŭskultu, jen aperas sterniĝanta serena largo — la ŝipo trapasis danĝeran rapidfluejon de la Flava Rivero, kaj tio aludas, ke aŭroro de la nova Ĉinio jam elmontriĝas kaj senlime plifortigas la memfidon de la revoluciuloj sur sia militira vojo. Fine, la fortepiano kondukas la muzikon denove en streĉan luktadon per forta glitado, tiu parto ne finiĝas per priskribo pri la iom-post-ioma malproksimiĝo de la remantaj ŝipistoj, sed per la ĉefa melodio de la ŝipistoj, tiamaniere elstarigante la heroan figuron de la ĉina proletaro kaj la ĉina revolucia popolo, kiuj deklaras kiel venkantoj: “Ni estas la mastro de la Flava Rivero, la mastro de Ĉinio!”

Tuj poste, per majesta melodio en adaĝo komenciĝas la dua parto “Himno al la Flava Rivero”, kiu kondukas nin en rememoron pri la historio. Kun la daŭra disvolviĝo de la fortepiana muziko, ĝia intenseco pli kaj pli altiĝas kaj grade puŝiĝas al kulmino. La potenca muziko, tute senigita de



*Ludado de la fortepiana konĉerto La Flava Rivero*

la sentimentaleco kaj mistera koloro religia de adaĝa parto de malnovaj konĉertoj, forte montras, ke **“la ĉinoj estas konataj tra la mondo ne nur pro sia eltenkapablo kaj laboremo, sed ankaŭ kiel liberama popolo kun riĉa revolucia tradicio”**, kaj per tio ĝi vekas en ni duoblan ardan amon al nia socialisma patrolando kaj instigas nin batali por ĝin defendi. En la komenco de la parto **“Indigno de la Flava Rivero”**, serena kaj klara preludo de bambua fluto en la tradicia stilo de norda Ŝenhi-provinco evidente temas pri la revolucia bazloko sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio. La muzika bildo kun vasta horizonto prezentas al ni belan pejzaĝon en la alta ebenejo de nordokcidenta Ĉinio kun abunda sunlumo. Imitante naciajn muzikilojn, la fortepiano produktas ĝojan kaj serenajn melodion, kiu pliapaŝe prezentas la batalan vivon prosperan kaj vivecplenan de la popolo de la revolucia bazloko de norda Ŝenhi. Ho Jan-an, la espero de la ĉina popolo, la lumturo de la liberigo de la ĉina proletaro kaj la revolucia popolo! Post momenta paŭzo, la fortepiano subite produktas pezajn basajn akordojn

kaj latunaj blovinstrumentoj produktas malserenajn obtuzigitajn tonojn — la japanaj agresantoj tretas per feraj kalkanumoj nian patrolandon. Nun la fortepiano elverŝas plendojn pri la profundaj suferoj de la ĉina popolo per rapidaj kaj tremaj tonoj. La sangaj kaj larmaj gutoj turniĝas en indignajn ondojn kaj formas la torenton de la Flava Rivero. **“La ĉinoj neniam submetiĝis al la malluma regado de reakciuloj”!** Sekve de konstante intensiĝanta interludo, eksplodas lavanga muziko de fortepiana solo, kiu montras la decidemon de la popolamasoj turni sian malĝojon kaj indignon en forton por batali kontraŭ la japanaj agresantoj, kaj tiamaniere kreas sufiĉan etoson por puŝi la tutan muzikon al ĝia kulmino **“Defendo de la Flava Rivero”**.

Je la komenco de **“Defendo de la Flava Rivero”**, latunaj blovinstrumentoj produktas majestan kaj sonorajn klarionadon plenan de batal-spirito, meze de kiu leviĝas la melodio de *Ruĝas la Oriento*, kiu reprezentas la batalan ordonon de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio por alvoki al la popolo de la tuta lando, ke ĝi organiziĝu, sin armu,



venku la japanajn agresantojn kaj batalakiru la finan venkon de la naciliberiga milito. Tuj sekve, fortepiana solo de firma kaj forta ascendo per oktavoj vivece priskribas la grandiozan scenon, ke la vastaj amasoj de armeanoj kaj popoloj en rezisto kontraŭ la japana agreso rapide mobiliziĝas sub la batala alvoko de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, kaj elstarigas la viglan kaj sensanceliĝan ĉefmelodion de "Defendo de la Flava Rivero". Sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la centmilionoj da armeanoj kaj popolanoj solide unuiĝas kaj brave marŝas antaŭen per firmaj paŝoj al la fronto por rezisto kontraŭ la japanaj agresantoj. Ĉi tie, la ĉefmelodio de "Defendo de la Flava Rivero" prezentas la tajde furiozantan popolan militon, ĝin prikantante de diversaj flankoj per variacio, kiu variigas la ĉefmelodion kaj donas diversajn nuancojn al ĝi. La ĉefmelodio de "Defendo de la Flava Rivero" komenciĝas per impona kaj potenca muziko de la tuta orkestro kun la fortepiano kiel la ĉefa instrumento, kaj poste la muziko subite malfortiĝas por montri, ke en densaj arbaroj kaj sorgokampoj ĉie batalas heroaj rezistantoj kontraŭ la japanaj agresantoj. Poste la muziko denove laŭtiĝas kaj pli kaj pli intensiĝas ĝia pulso kun alterna ludado de la fortepiano kaj la aliaj instrumentoj simile al ondoj jen leviĝantaj jen malleviĝantaj unu post alia kaj simile al vokoj sekvataj de tujaj respondoj, por prezenti, ke en batalado la revoluciaj armitaj fortoj senĉese kreskas de malgrandaj al grandaj kaj de malfortaj al fortaj. La riĉaj kaj klaraj muzikaj figuroj vekas asociadon ĉe la aŭskultantoj pri la heroaj bataloj de la Okavoja Armeo, Nova Kvara Armeo, gerilaj taĉmentoj kaj milicianoj kontraŭ la japanaj agresantoj. Niaj trupoj jen antaŭen marŝas kaŝe, jen leviĝas por sturmo, jen galopas sur ĉevaloj. Kiel superba bildo de popola milito! Kiam la muziko atingas la kulminon, leviĝas la muziko de *Ruĝas la Oriento* ĝisĉiele sonoranta, atribuante la kompletan venkon de la granda kontraŭjapana naciliberiga milito de la ĉina popolo al la plej fundamenta punkto — ĝi estas brila venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso!

La proletaro kaj la revolucia popolo de Ĉinio ja ne ĉesigis sian bataladon pro la venko. La kombinita melodio el *Ruĝas la Oriento* kaj *La Internacio*, kiu aperas en la finalo, solene proklamas al la tuta mondo: **"La popolo jam venkinta en sia revolucio devas helpi la popolojn batalantajn por sia liberiĝo. Tio estas nia internaciisma devo."** Tiu finalo levis la tutan muzikan verkon en tute novan mondon de komunisma ideologio.



## NOVTIPA BREMSŬO EL SINTEZA PLASTO

La Nankina Fabriko de Asbestaj Plastaĵoj sukcese provproduktis novtipan bremsŝuon el sinteza plasto.

Bremsŝuo estas grava maŝinparto por sekura veturado kaj altigo de la rapideco de vagonaro. Dum la provfabrikado, la laboristoj disvolvis la spiriton de senĉesa revoluciado, elmetis la proponon uzi abundan kaj malkaran skorian lanon anstataŭ asbeston kiel ĉefan materialon de bremsŝuoj el sinteza plasto, kaj sukcesis finfine post unu-monata provfabrikado.

Provuzado de tiu novtipa bremsŝuo sur atrapida vagonaro en lasta tempo montris, ke ĝia uzodaŭro estas trioble pli longa ol tiu de gisfera bremsŝuo kaj ĝi funkcias tre bone.

## RIĈA RIKOLTO EN FIŜKAPTO

Forte tenante la revolucion kaj energie stimulantante la produktadon la vastaj amasoj de fiŝistoj en Liaŭning, Ŝandong, Ĝegiang kaj Guanghi de nia lando apud la maroj akiris riĉan rikolton en la printempa fiŝsezono.

La kvanto de kaptitaj fiŝoj en la printempa fiŝsezono de Liaŭning estas rekordo de la sama sezono en la lastaj jaroj. Ĝis la mezo de aprilo, la kvanto de la kaptitaj fiŝoj kaj salikokoj de Ŝandong-provinco pliiĝis je 70 procentoj kompare kun tiu de la sama periodo de la pasinta jaro. De la komenco de aprilo ĝis la unua tagdeko de majo, Ĝegiang vendis al la ŝtato 13,000 tunojn da grandaj kaj malgrandaj ŝtonkapaj fiŝoj (*pseudosciaena crocea* kaj *pseudosciaena polyactis*) kaj aliaj fiŝoj. La fiŝistoj de la kvar apudmaraj gubernioj kaj urboj de Guanghi fiŝkaptis por revolucio, heroe venkis la malfavorajn kondiĉojn de malalteco de temperaturo kaj multeco de ventegoj kaj akiris riĉan rikolton en la fiŝkaptado de la printempa fiŝsezono de la kuranta jaro.

**Lin Biaŭ**

# **VIVU LA VENKO DE POPOLA MILITO**

—Memore al la 20-a Datreveno de la Venko de la  
Kontraŭjapana Rezistmilito de la Ĉina Popolo

(En Esperanto)

**Enhavo**

1. La Ĉefa Kontraŭdiro en la Periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj la Linio de la Partio
2. Ĝuste Plenumi la Linion kaj Politikon de la Unuecfronto
3. Sinapogi sur la Kamparanoj, Fondi Kamparajn Bazlokojn
4. Konstrui Popolan Armeon de Nova Tipo
5. Praktiki la Strategion kaj Taktikojn de Popola Milito
6. Persisti pri la Politiko de Sinapogo sur la Propraj Fortoj
7. La Internacia Signifo de la Teorio de Kamarado Maŭ Zedong pri Popola Milito
8. Venki la Usonan Imperiismon kaj Ĝiajn Lakeojn per Popola Milito
9. La Ĥruŝčov-reviziistoj Estas Perfiduloj de Popola Milito

84 pĝ.

14.5×9 cm.

en broŝuro

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas: Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo,

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio



# Montanoj Lernas Filozofion

**L**A malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj en nia vasta kamparo akiris unu venkon post alia en siaj bataloj kontraŭ la ĉielo, tero kaj klasaj malamikoj, aplikante la filozofiajn pensojn de Prezidanto Maŭ. Sanguanmiaŭ-brigado de Dengfeng-gubernio de Henan estas bona modelo en viva studo kaj viva apliko de la filozofiaj verkoj de Prezidanto Maŭ.

## INSPIRO DE ŜTONO

En 1957 la granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis: **“Ni postulas ke ni iom post iom disvastigu la dialektikon kaj ke ni iom post iom ellernu apliki tiun ĉi sciencan metodon de dialektiko.”** La kadroj kaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Sanguanmiaŭ-brigado varme respondis al la alvoko de Prezidanto Maŭ, volis lerni filozofion, posedi la armilon de batalo kaj rapide ŝanĝi fizionomion de la montregiono. Sed troviĝis inter ili apenaŭ kelkaj legsciintoj, ĉar ili profunde suferis en la malnova socio kruelajn subpremon kaj ekspluaton fare de la tri malamikoj imperiismo, feŭdismo kaj burokrata kapitalismo. Por venki la malfacilojn de manko de klereco, ili starigis revolucion kaj klerigan lernejon, por samtempe lerni kulturon kaj filozofion. Kamarado Gaŭ Ĉanghaj, sekretario de la distrikta partia komitato estis elektita kiel instruisto.

Kamarado Gaŭ Ĉanghaj havis nur klerecon de diplomito de elementa lernejo. Kiel instrui? Pri tio li ne havis certecon. Li aĉetis *La Ordinaran Scion pri Filozofio* kaj lekciis laŭ ĝi, sed la lernantoj nenion komprenis. Tio tre ĉagrenis lin. Li ekpensis la instruon de Prezidanto Maŭ pri kombino de teorio kun praktiko kaj decidis liberigi sin el kateno de la filozofia lernolibro. Elirante de la trajtoj ke ĉie troviĝas ŝtonoj en Sanguanmiaŭ triflanke ĉirkaŭata de montoj li portis ŝtonon en la klasĉambron kiel lernan materialon kaj demandis la lernantojn:

“Kio estas tio?”

“Ni ĉiuj vivas sur ŝtonamasoj de generacio al generacio, ĉu ŝtonon ni ankoraŭ ne konas?” ĉiuj eksplodis per ridego.

“Ĉu vi povas koni ŝtonon, se tute ne estus ŝtono en la mondo?” denove demandis li.

“Sendube, oni povas koni objekton en la mondo nur post pririgardo. Kiel ni povas koni tion, kio eĉ ne ekzistas en la mondo?”

Gaŭ Ĉanghaj diris: “Vi diris prave. Nur kiam en la mondo troviĝas ŝtono, ni povas ĝin koni. Jen tio estas: Subjekto spegulas objekton. La ŝtono ĉiam ekzistas, tute egale, ĉu vi konas ĝin aŭ ne. En la filozofio, ŝtono estas ‘materio’ aŭ ‘ekzisto’, dum kono de homo al ŝtono estas ‘penso’ aŭ ‘spirito’; kiam ni konis karakterojn de ŝtono, ni povas konstrui per ĝi domojn kaj akvokonservujojn, jen estas rolo de la subjekta aktivo. Elvolvante la rolon de la subjekta aktivo oni povas sukcesi en laboro. Tiuj rezonoj estas materiismo en filozofio.”

Post la leciono la lernantoj ekdiris inter si: “Tio estas filozofio. Tiun lecionon ni facile komprenis.” Kaj ĉiam pli ardiĝis ilia fervoro en lernado de la filozofio.

## LERNADO EN KOMBINIĜO KUN LA PRAKTIKO DE KLASA BATALO

Filozofio estiĝis pro ekzisto de la klasa batalo. La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Sanguanmiaŭ-brigado ĉiam prenas la klasan batalon kiel la ĉefan lernoobjekton en lernado de la filozofio.

En printempo de 1958, en la Agrikultura Produkta Kooperativo de Sanguanmiaŭ aperis iuj problemoj kaj de tio brule maltrankviliĝis la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj. Ding Lajhe kaj kelkaj aliaj malriĉkampanoj serioze lernis *Pri Kontraŭdiro*. Ili analizis la situacion de la klasoj,

klasaj kontraŭdiroj kaj klasa batalo en sia vilaĝo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj trovis fiulon uzurpintan la oficon de kooperativa estro, kiu koluziis kun bienuloj, patronis kontraŭrevolu-ulojn kaj okupiĝis pri malversacio kaj ŝtelado. Ili do kune kun la aliaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj fine faligis la fiulon post ripetadaj bataladoj, reprenis la gvidantecon kaj tiel aperigis novan fizionomion en la revolucio kaj produkto.

Sub la bonega situacio de profunda disvolviĝo de la batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, plenmano da klasaj malamikoj denove intencis subfosi socialismon en ekonomio. Ili dissemis malican diron "terkulturi en la montvalo kondukos al nenio rimarkinda; prefere estas entrepreni komercon ekstere", intencante blovi herezan venton de kapitalismo. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ ke objekto ĉiam dividiĝas unu en du, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Sanguanmiaŭ analizis la tiaman situacion. Ili diris: "En la bonega situacio ni devas vidi ke la klasaj malamikoj ankoraŭ levas ventojn kaj ondojn. En la kampo de ideologio ankoraŭ ekzistas la batalo inter la vojoj socialisma kaj kapitalisma." Ili forte kritikis reviziismajn varojn de Liu Ŝaŭki kiaj "tri pliigoj kaj unu fikso", "kvar liberoj" k. a., batalis kontraŭ bienula elemento kiu subfosis la kolektivan ekonomion, kaj per tio forte batis la kapitalisman tendencon.

Pere de lernado de la filozofio ankaŭ ili disrompis superstiĉojn kaj ŝanĝis spiritan fizionomion de homoj. En printempo de 1958, ĉe Sanguanmiaŭ, la klasaj malamikoj artifikis frekventon de diabloj kaj dioj por trompi amasojn kaj subfosi la revolucion kaj produkton. La filozofia instruisto prenis tiun ĉi okazon kiel ekzemplon kaj pere de aktualaj faktoj lekciis pri ateismo por malkovri la intrigon de la klasaj malamikoj. Kadroj instigis tiujn, kiuj modlis argilajn idolojn en la pasinteco, rakonti sian komprenon, ke "bodisatvoj" estas nenio alia ol amaso da argilo. Ili alportis de monto putran lignon de ĉerko por vidigi al ĉiuj fosforan lumon kaj per tio malkovris la sekreton pri "fantoma vaglum". Kiam la amasoj konsciiĝis en la ideologio, ili unuj post aliaj leviĝis malkovri kiel bienuloj kaj riĉuloj faris nekromancion kaj fantoman frekventon por trompakiri monon. Fan Sujhiu, maljuna malriĉkampano kun aĝo de pli ol 80 jaroj, diris emocie: "En la malnova socio mi kultis diojn dum kelkdek jaroj, sed mi fine devigite vendis miajn infanojn.

Nun dank' al la gvido de Prezidanto Maŭ, mi Fan Sujhiu jam ne bezonas timi pri manko de manĝo kaj vesto. Se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, ĉu mi havus hodiaŭon! Ĉiu ajn dio kaj diablo estas malbonaĵoj, per kiuj la bienuloj kaj riĉuloj trompis nin malriĉulojn!"

## LERNI FILOZOFION EN LA PRODUKTA BATALO

Sanguanmiaŭ-brigado karakteriziĝas per multaj agroj kaj multaj loĝantoj, per maldika grundtavolo kaj abundo de ŝtonoj. Ĉu oni povas ŝanĝi tiujn kondiĉojn de la naturo? Kun tiu ĉi problemo ili studis la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ kaj lian grandan instruon "**Malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**" kaj lernis de Daĝaj kaj aliaj progresaj unuoj heroaĵojn en transformado de la naturo. Ĉiuj profunde ekkonis, ke homoj estas la plej grava faktoro, ke la decida faktoro por ŝanĝi la fizionomion de postrestinteco kaj malriĉeco estas homoj sed ne la naturaj kondiĉoj, ke oni povas ŝanĝi sterilan agron en fekundan kampon kaj rikolti multe da greno sur relative malpli multe da tero, se homoj sin armas per Maŭzedongpenso, streĉas plene la energion, penege kaj lerte laboras.

En 1958, en Sanguanmiaŭ leviĝis alta tajdo de akvoutiliga konstruado. Kadroj gvidis komunumanojn studi *Pri Praktiko* sur konstruejo de akvokonservejo. Komunumanoj diris: "En la malnova socio, dum akvostagna inundo ni timis akvon kaj dum sekegeco ni aspiris al akvo. Ĉar tiam ni ne konis la leĝon de akvo, eĉ se ni ĝin konus, ni ankaŭ ne havis kondiĉon ĝin utiligi. Nun, la Partio gvidas nin konstrui akvokonservejon por pli bone servigi akvon al la agrikultura produkto, ni do unue devas bone koni la leĝon de akvo." Kaj kadroj kaj amasoj kune faris terenan kaj hidrografian esploron kaj esploris la grundan strukturon. Post detala diskutado de la amasoj kaj takso pri ĉiuj favoraj kaj malfavoraj faktoroj estis ellaborita praktikebla projekto de konstruo. Dank' al klopodo de la amasoj fine estis sukcese konstruita la akvokonservejo.

Malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj diris: "Vojo estas elhakita de homoj, greno estas rikoltita dank' al terkulturado de homoj, kaj kondiĉoj estas kreitaj de homoj. Antaŭ ol transformi la naturon ni devas unue remuldi nian ideologion. Kun heroa volo terkulturi por la revolucio ni certe povas turni la malriĉan montvalon en riĉan."



Granda ŝanĝiĝo de la spirita fizionomio kaŭzis grandan disvolviĝon de la produkto. Post penema luktado en malfaciloj Ligoŭdong-produktgrupo fosis pli ol 60 drenajn kaj irigaciajn kanaletojn, starigis pli ol 100 kamprandajn ŝtonbaraĵojn kaj reformis 70 procentojn de agroj en ebenajn teraskampojn. En 1968, la pomua produktkvanto de greno de la produkta grupo kreskis de 239 ĝinoj antaŭe ĝis 517.

En vintro de 1969, per penega laborado de 27 tagoj la komunumanoj de Sanguanmiaŭ-brigado faris profundan plugadon sur pli ol 550 muoj da

kampoj kaj konstruis teraskampojn el ŝtonozaj montdeklivoj. En la batalo kontraŭ la naturo ili pluapase komprenis la grandan veron “ŝanĝiĝo de materio en spiriton kaj ŝanĝiĝo de spirito en materion”.

Kun senkompare profunda proletara sento al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Sanguanmiaŭ-brigado heroe diris: “Ni nepre agos laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ ‘ke la filozofio liberiĝu el la klasĉambroj de filozofoj kaj el la libroj kaj fariĝu akra armilo en la manoj de la amasoj’.”

# Abunda Rikolto de Somermaturaj Grenoj en Nia Lando

**P**OST abundaj rikoltoj de somermaturaj grenoj en sinsekvaj jaroj, nia lando denove akiris abundan rikolton de tio en la ebenejo de la Flava Rivero kaj Huajhe-rivero kaj la provincoj sude kaj norde de Jangzi-rivero, kie troviĝas la ĉefaj produktoj de somermaturaj grenoj. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkampara-

noj ĝoje diris, ke tio ĉi estas granda venko de Maŭzedongpenso, estas giganta frukto akirita en efektivaigo de la spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio! La komunumanoj de diversaj lokoj ĝoje liveras impostan grenon kaj vendas superfluan grenon al la ŝtato por aktive subteni la socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon de la patrolando.



*Komunumanoj de Giangĝang-komunumo de Fugang-gubernio, Ŝenhi-provinco selektas tritikon.*

Ekde majo, la someraj grenoj iom post iom maturiĝis de la sudo al la nordo kaj sekve komenciĝis rikoltado. Statistiko pri la rikolto de diversaj lokoj montras, ke escepte de iuj regionoj, la somera rikolto de greno en la tuta lando grandskale pli-abundiĝis kompare kun tiu de la pasinta jaro. Surbaze de la riĉa rikolto de someraj grenoj en la pasinta jaro, ĉijare la provincoj Henan, Hebej, Ŝenhi, Giang-su k. a., kiuj formas la ĉefan produktojn de tritiko, akiris pli abundan rikolton. La totala produktokvanto de someraj grenoj de la provincoj kaj municipoj Hubej, Ĝegiang, Gianghi, Fugian, Guangdong, Ŝanhajo kaj Tiangin estas je pli ol dekono pli granda ol tiu en la pasinta jaro. Ankaŭ la totala kaj pomua produktokvantoj de someraj grenoj de pekinaj antaŭurboj superis tiujn de la somera riĉrikolto en 1969. La provincoj Junnan, Gujĝoŭ kaj Siĉuan en la Sudokcidento ŝanĝis sian malnovan kutimon rigardi la printempajn plantaĵojn ne gravaj, aktive plivastigis la plantareon kaj pligrandigis la totalan produktokvanton de la someraj grenoj je pli ol dudek procentoj kompare kun tiu de la pasinta jaro. Ankaŭ la provincoj Ŝandong, Ŝanhi kaj Anhuj, kiuj suferis longan trosekecon en la lasta vintro kaj printempo de la kuranta jaro, akiris relative bo-


nan rikolton de la someraj grenoj dank' al penemaluktado de la vastaj amasoj de komunumanoj. En tiu ĉi jaro aperis nombro da avangardaj tipaj unuoj, kiuj altigis aŭ plialtigis sian produktokvanton kaj aperis granda nombro da distriktoj de grandarea riĉa rikolto.

Dum la klopodado por akiri riĉan rikolton de someraj grenoj en la kuranta jaro, la partiaj organizoj kaj revoluciaj komitatoj de diversaj lokoj serioze efektivigis la spiriton de la Naŭa Kongreso de la Partio, gvidis la vastajn amasojn de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj aliaj komunumanoj pene studi la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo kaj senĉese altigis ilian konscion pri klasa batalo kaj linia batalo kaj altigis ilian konscion pri daŭra revoluciado, por ke ili starigu la penson de agrikulturado por la revolucio. Ili forte kritikis la kontraŭrevolucionan reviziisman linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, forte kritikis konservativajn pensojn kaj eraran opinion de atingo de kulmina punkto en produkto, starigis por si altan celon kaj aktive kreis kondiĉojn por pliprodukto. La vastaj amasoj de

*Alia bona rikolto de tritiko en Maloŭ-komunumo de Luŝan-gubernio, Henan-provinco*







*Membroj de Jelin-komunumo de Lingŝuj-gubernio de Hajnan-insulo zorge draŝas frue maturiĝintan rizon.*

komunumanoj en la provincoj Siĉuan, Hunan, Hubej, Gianghi, Junnan, k. a., kiuj ĉefe produktas rizon, rompis la rutinajn limigojn, aktive kulturebligis virgan teron, pligrandigis la areon de plurfoja planto kaj ĉiamaniere klopodis por pligrandigi la rikoltan kvanton de la someraj grenoj. Laŭ nekompleta statistiko, en la sudĉiniaj provincoj, la plantareo de tritiko en la kuranta jaro pliiĝis je ok milionoj da muoj. En la lasta vintro kaj printempo de la kuranta jaro, la provincoj en la basenoj de la Flava Rivero kaj Huajhe-rivero, kiuj ofte suferas de trosekeco, ĝenerale kaj energie kondukis fundamentan irigacian konstruadon, konstruis grandan nombron da irigaciaj lagetoj, akvokonservejoj, maŝinputoj kaj irigaciaj kanaloj, kiuj multe bonigis la irigaciajn kondiĉojn. Samtempe kun tio, en ĉiuj lokoj oni energie faris profundan plugadon kaj ebenigon de kampoj, plivastigis la aplikon de semoj de kontraŭrustmalsana kaj multedona tritiko kaj uzis pli multe da baza sterko kaj akcela sterko.

Tiuj aranĝoj ludis gravan rolon en la riĉa rikolto de someraj grenoj en la kuranta jaro. Depost la semado en la lasta aŭtuno la provincoj Henan, Ŝandong, Hebej, Hubej, Giangsu, Anhuĵ, Ŝenhi kaj Ŝanhi estis minacataj de diversgrada trosekeco; en printempo, kiam la tritiko reverdiĝis, kvankam partoj de tiuj provincoj ĝuis mildiĝon de la trosekeco, tamen ili trafis printempan malvarmon kaj, je la lasta stadio, en parto de ili aperis plago de fiinsektoj kaj seka varma vento. Sed neniu malfacilo povis subigi la vastajn amasojn de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj aliaj komunumanoj armitajn per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso. Sub la gvido de la diversnivela partiaj organizoj kaj revoluciaj komitatoj, ili batalis obstine kontraŭ la naturaj katastrofoj prenante la malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn de Daĝaj kiel modelon kaj disvolvante la revolucion spiriton timi nek malfacilojn nek morton, kaj finfine akiris bonan rikolton.

# Ĝojiga Riĉrikolto Ambaŭflanke de Tuohe-rivero

Tuohe-rivero estas unu el la ĉefaj branĉoj de Huajhe-rivero. Ĝi devenas de Ŝangkiu-gubernio, Henan-provinco, fluas sudorienten tra Hiaji kaj Jongĉeng, poste eniras la nordan parton de Anhuj-provinco kaj fluas en Hongze-lagon de Giangsu-provinco.

En novembro de 1966, popolanoj de la tri provincoj Henan, Anhuj kaj Giangsu, responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ "Nepre jungu Huajhe-riveron", komencis grandan konstruon por jungi Tuohe-riveron kaj fosi la Novan Bianhe-riveron. Post pli ol 3-jara penema lukto en malfaciloj, ili pretigis, per larĝigo de malnova fluejo kaj foso de nova fluejo, kanalon kiu fluas tra parto de la tri provincoj.

Kun la kompleta jungo de Tuohe-rivero, oni konstruis ambaŭflanke de ĝi diversajn irigaciajn kanaletojn por formi kompletajn irigaciajn sistemojn, kaj per tio radikale ŝanĝis la pasintan staton de inundiĝo pro nefordrebla akvo.


Hodiaŭ, ambaŭborde de Tuohe-rivero ĉie vidiĝas sceno de riĉa rikolto. La vastaj amasoj de komunumanoj ĝoje okupiĝas pri rikolto de tritiko.

*Komunumanoj rikoltas tritikon.*





# ŭborde



*Drena kluzo konstruita de Liuloŭ-brigado de Zanjang-komunumo de Jongĉeng-gubernio povas bari riveran akvon por irigacio dum sekegeco kaj dreni akvon dum inundo. Ĝi ebligis ĝeneralan irigacion en agrikulturo de la brigado, kaj ludis tre gravan rolon en la kurantjara riĉrikolto de tritiko.*


*Iu kamparana scienca studrondo faras ekspertizon pri antimalsana kapablo de diversaj specioj de tritiko.*





*Intelektaj junulinoj fiksligintaj en kamparo interŝanĝas sian komprenon pri akcepto de reeduko.*

*Transporto de tritiko*





# Mi Estas Hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio

**A**NTAŬ la Granda Proletara Kultura Revolucio mi estis estro de la Pekina Ĝenerala Trikota Fabriko. Pro malalteco de mia konscio pri la batalo inter la du linioj, mi sekvis la kontraŭrevolucion reviziisman linion de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, praktikis principon "la profesia laboro en la unua loko", faris limigon, obstrukcon, subpremon kaj punon kontraŭ la laboristaj amasoj kaj tiel direktis la fabrikon al misvojo. En la komenca periodo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, mi plie fariĝis rezista forto de la revolucia amasa movado.

Sub la helpo de la ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en la fabriko kaj de la vastaj revoluciaj amasoj, mi revenis al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

## REVOLUCIA LINIO DE PREZIDANTO MAŬ DONIS AL MI NOVAN VIVON

Prezidanto Maŭ instruis al ni: "Ni devas iri inter la amasojn, lerni de ili..." En oktobro 1966, la revoluciaj amasoj decidis ke mi laboru en la laborejo de blankigo kaj tinkturo kaj ricevu edukon en ŝtormo de amasaj bataloj. Ĉar antaŭe mi longe apartigis min de la laboristoj, alte lokante min supre, mi kvazaŭ venis al nova mondo, enirinte en la laborejon, kaj ricevis edukon neniam ricevitan. Ekzemple, la vaksmaŝino, kiun ni plurfoje provis konstrui laŭ fremdlanda maniero sen rezulto, estas nun rapide konstruita sukcese de la laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso laŭ propraj manieroj. Tiu fakto donis al mia adormo al fremdlanda tekniko solidan baton. Kiam okazis perturbo en la bakmaŝino, laboristoj tuj ĝin riparitis en temperaturo de 50-60 gradoj. Ilia revolucia spirito timi nek malfacilojn nek morton forte forlavis la venenajn influojn de la teorio "la amasoj estas malprogresemaĵoj" el mia kapo. Pro malbona ventolado, densa nebulo plenigis la laborejon dum produktado, kaj facile povis okazi akcidento okaze de nesufiĉa atento. Mi pensis: Kiel oni povas longe labori sub tiaj kondiĉoj? Ĝuste en tiu tempo, venis al mi maljuna laboristo. "Maljuna Ĉu,"

li diris, "jen vi havas la ŝancon persone gustumi ĉi tie. Kiomfoje ni plendis pri la malbona ventolado en la laborejo, sed ĉio dirita eniris tra unu el viaj oreloj kaj eliris tra la dua. Kiom pezas la suferoj kaj plendoj de laboristoj en via koro?" Ĉiu vorto de tiu laboristo falis kiel peza martelo sur mian koron. Jes! Antaŭe, mi bone sciis, ke tiu ĉi laborejo estas malbona je la ventolado, nebuloza, abunda je acido kaj alkalo, kaj tie la laboro estas peza, tamen, mi ne nur ne klopodis solvi la problemon, sed, kontraŭe, sendis ĉe plej malgrava motivo laboristojn, kiujn mi konsideris malobeemaj, al tiu laborejo kiel puno al ili. Nun, komparante la revolucion spiriton de la laboristoj kun miaj propraj faroj en la pasinteco, mi ekkonsciis, ke la kaŭzo de mia malobservo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kuŝis en mia longa apartiĝo de fizika laboro kaj de la amaso. Mi decidis en mi, ke mi nepre akceptos bone la reedukon de la laboristoj kaj ĝisfunde reformos mian mondkoncepton.

Kiam mi ekhavis ian konscion dank' al hardado en fizika laboro, la revolucia komitato de la fabriko donis al mi ŝancon vaste aŭskulti opiniojn de la amasoj en la tuta fabriko. Mi vizitis pli ol mil laboristojn. Ĉie kien mi venis, la laboristoj meminitate salutis min kaj varme eldiris al mi siajn opiniojn. La revoluciaj amasoj elektis por mia lernado centojn da eldiroj de Prezidanto Maŭ konekse kun miaj problemoj, por ke mi ĝuste komprenu la gravan signifon de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĝuste traktu la amasojn, ĝuste traktu kaj ĝisfunde korektu miajn erarojn kaj por ĉiam estu fidela al Prezidanto Maŭ. En ligo kun miaj eraroj, mi lernis tiujn eldirojn unun post alia. Ju pli mi lernis ilin kaj komparis kun miaj faroj, des pli mi sentis, ke la instruoj de Prezidanto Maŭ estas aparte celkonformaj por mi kaj ke mi estis multe kulpa al la amasoj. Ĉu estas ie kaj iam tia zorgemo kiel montrita de Prezidanto Maŭ en traktado al erarintaj kadroj! Kiom da energio foruzis la amasoj por efektiviĝi la kadran politikon de Prezidanto Maŭ!

Sub la kritikoj kaj edukado de la revoluciaj amasoj, post periodo da hardado en fizika laboro, ekŝanĝiĝis mia starpunkto kaj sento, klariĝis al mi firma kaj ĝusta politika direkto, foriĝis la burokrata laborstilo de "tri apartiĝoj", kaj vigliĝis la revolucia spirito de luktado en malfaciloj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, mi iris inter la amasojn por profunde kritiki mem miajn erarojn kaj serioze korekti ilin.

### DAŬRA REVOLUCIADO

Kiam la organizo decidis ke mi laboru en la produkta grupo sub la revolucia komitato, mi havis multajn timojn. En la pasinteco mi faris erarojn ĝuste en direktado de produktaj laboroj, kaj hodiaŭ mi denove estis ŝarĝita per la sama tasko, tial mia penso ne povis akcepti tion. La revoluciaj amasoj jam plene travidis tion. Multaj kamaradoj serioze montris al mi, ke kiel revoluciuloj oni devas kuraĝe preni sur sin pezan ŝarĝon por la revolucio. Ili ankaŭ pacience kaj sincere min helpis studi la instruon de Prezidanto Maŭ: "Spertinte malsukceson, oni ĉerpas el ĝi lecionon kaj korektas siajn pensojn por ilin konformigi al la leĝoj de la ekstera mondo, kaj tiel povas turni malsukceson en sukceson; ĝuste en tio ĉi kuŝas la signifo de la proverbo: 'Malsukceso estas la patrino de sukceso', kaj 'Falo en fosajon, gajno en saĝo'." Sub la helpo kaj kuraĝigo de kamaradoj, mi kuraĝe akceptis la decidon de la organizo kaj ekfunkciis kiel estro de produkta grupo kaj vicĉefkomitatano de la revolucia komitato kaj krome partoprenis en la laboroj de la partia komitato, respondecante pri la produkto de la tuta fabriko. En miaj laboroj, mi memoras la lecionon ricevitan el antaŭaj eraroj kaj ĉiam pensas pri tio, kiel instruis Prezidanto Maŭ kaj kiel mi devas agi, por gardi min de denova faro de mispaŝoj.

En majo de la lasta jaro, sub la kuraĝigo de la spirito de la 9-a Kongreso de la Partio, la revolucia komitato elmetis la proponon plenumi la jaran produktan planon je tri monatoj antaŭtempe por gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj por la granda socialisma patrolando, kaj la laboristaj amasoj levis konkursan alttadjon por teni la revolucion kaj stimuli la produkton. Tiam aperis kontraŭdiro inter la trika laborejo kaj la kunkudra laborejo en liverado de trikaĵo, pro la obliga kreskado de konsumkvanto de trikaĵo rezulte de flugrapida progreso en vestokunkudro. La nesufiĉa provizo de trikaĵo rekte minacis la plenumon de nia antaŭensalta plano. Kion fari? Tiam mi povis apliki du rimedojn: limigi la produktan kvanton de vestokunkudro, por ekvilibrigi pasive

la produkton de trikaĵo kaj vestokunkudro, aŭ en la tempo de daŭra antaŭensalto de vestokunkudro, disvolvi la latentan produktforton de la trika laborejo por aktive akceli realigon de nova ekvilibro de produkto de trikaĵo kaj vestokunkudro. La unua rimedo estis senriska kaj cetere unika rimedo aplikebla laŭ rutino. La dua estis "riska"; ĉe malbona okazo ĝi eble malordigos la regulan iradon de produkto kaj fiaskigos la tutan planon. Tiuokaze mi devus porti la respondecon. Kiel agi estas plej bone? Kun tiu demando mi lernis kune kun la kamaradoj de la produkta grupo la instruon de Prezidanto Maŭ: **Politiko estas komandanto, estas animo.** "El ĉiuj aferoj en la mondo, homo estas la plej valora. Sub la gvido de la Komunista Partio, se nur estas homo, ĉiaj mirakloj povas esti kreitaj." Ni kritikis krome la teoriojn propagandatajn de Liu Ŝaŭki "produkto en la unua loko" kaj "la amasoj estas malprogresemaj" kaj kuraĝe alprenis la duan rimedon. Mi iris al la trika laborejo kaj klopodis trovi kune kun la laboristoj la malfortajn ĉenerojn, resumi progresintajn spertojn kaj movi ĉiujn aktivajn faktorojn. Disvolvante la spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj luktado en malfaciloj, la laboristoj alportis 8 trikajn maŝinojn, kiujn oni konsideris senutilaj jam antaŭ dek jaroj, kaj ilin riparis en kelkaj tagnoktoj por reutiligi ilin en produktado. Ili pliigis la rapidecon kaj provizajn liniojn de la rip-maŝinoj kaj tiel duobligis la laborefikon. Plie, per rompo de la limo inter malsamaj laborspecoj por plejeble disvolvi la homan subjektivan aktivecon, estis rapide turnita la pasiveco en aktivecon kun la rezulto de granda kresko de la produkto de la trika laborejo. Tiel, la diversaj laborejoj reciproke akcelis kaj kuraĝigis unu alian kaj rezultigis ke la jara produkta plano estis plenumita 112 tagojn antaŭ la difinita dato.

En praktiko de batalo mi profunde ekkonis ke en la amasoj latentas senfina socialisma aktiveco, kiun oni povas ekkoni kaj movi nur per elstarigo de proletara politiko kaj kuna batalo ŝultron ĉe ŝultro kun la amasoj. Tiam, foriĝis de mi la erara penso "danĝere estas direkti la produktadon" kaj al mi kreskis la memfido por porti pezan ŝarĝon, leviĝis la memkonscio de komando de produkto per revolucio.

De nun mi decidis pli bone vive studi kaj vive apliki la grandan teorion de Prezidanto Maŭ pri daŭra revolucio sub la diktaturo de la proletaro, ĝisfunde reformi mian mondkoncepton kaj revolucii dum la tuta vivo, strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.



# “Tre Feliĉaj Estas la Ĉinaj Virinoj”

**M**I estas laboristino de la Lana Ŝpinteksejo de Ŝenjang.

Antaŭ la Liberiĝo, mia familio loĝis en Vejhaj-gubernio, Ŝandong-provinco. Mia patro estis malriĉa fiŝisto, kiu suferis ekspluatadon kaj subpremadon de fiŝist-tirano dum la tuta vivo. Por vivteni la familion li ofte fiŝadis en maro spite al ventego sub devigo de la tirano. Iufoje li dronis kun la boato en la maron kaj mortis. Post lia morto la senkompata tirano kiel antaŭe devigis nin pagi fiŝrentumon. Trovante nenian alian rimedon, miaj du tre junaj fratoj transprenis la pezan ŝarĝon de mia patro kaj post nelonge ankaŭ ili mortis pro turmentado.

En 1941, mia familio kun kvar membroj neniel povis sin vivteni, kaj mia patrino kondukis nin gefratojn al Ŝenjang, almozetante dum la vojo. Helpate de samvilaĝano mia patrino kaj ni gefratoj eklaboris en iu fabriko funkciigata de japanoj. Tiam mi estis nur okjara kaj iomete pli alta ol tablo, tamen mi jam komencis mizeran vivon de infanlaboristo.

En parolo pri la amaraĵoj de infanlaboristoj, la klasa malamo kaj nacia indigno samtempe plenigas mian koron. La kruelaj japanaj diabloj devigis nin infanlaboristojn labori ĉiutage dekkelkajn horojn same kiel plenkreskulojn, nia manĝaĵo estis faruno de kverksemo, rekremento de sojo kaj putraj kukurboj; la loĝejo estis tre malvasta kaj somere en ĝi regis sufoka malbonodoro, ĉie rampadis pedikoj kaj cimoj; vintre ĝi similis al glaciejo en kiu ĉie sur la muroj estis glacio kaj prujno.

Iun vintran tagon, kiam mi laboris, subite mia tria frato alkuris al mia laborejo en konsterniĝo kaj kriis anhelante: “Lianzi, brulas la jutmoliga laborejo, kaj nia patrino...” Antaŭ ol li finis la parolon, mi plenforte ekkuris en la direkto de la brulanta laborejo spite al la malhelpo de laborestro. Timante disvastiĝon de la fajro al aliaj

laborejoj, “bum!” la senhomecaj japanaj diabloj rapide fermis la feran pordon de la brulanta laborejo. Tiel, mia patrino kaj laboristoj, kiuj ne havis tempon por elkuri, ĉiuj estis bruligitaj vivaj...

Nelonge post tio ankaŭ mia fratino mortis en indigno pro malhonorigo minace farita de laborestro. En kelkaj jaroj la kuomintanga reakciularo kaj la japana imperiismo englutis kvin membrojn de mia familio. Mi neniam forgesos la suferitan sangan maljustaĵon dum la tuta vivo!

En la malnova socio, kiu estis surtera infero, virinoj estis subpremitaj en ĝian plej malsupran tavolon. Tiam, ni laboristinoj havis senfinajn larmojn kaj suferojn! La japana imperiismo, kuomintanga reakciularo kaj de ili bredataj laborinspektoroj kaj laborestroj ĉiamaniere insultis, batis kaj ofendis junajn laboristinojn; ĉiutage ĉe eniro kaj forlaso de la fabriko ni estis tutkorpe traserĉitaj. Kiam laboristino naskis infanon, ŝi tuj estis eksigita de la fabriko. Sed, al kiu ni povis plendi pri niaj suferoj kaj ricevataj maljustaĵoj en la nigra malnova Ĉinio!

En novembro de 1948 Ŝenjang liberiĝis. Ekde tiam ni sklavoĵoj en la malnova socio stariĝis. Sub la saĝa gvido de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, firme sekvante la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**sinapogi sur propraj fortoj, peneme lukti en malfaciloj**”, la laborista klaso konstruis grandan modernan kombinumon de lana ŝpinteksado, kiu havas 5,000 laboristojn, sur la ruino postlasita de la japana imperiismo kaj kuomintanga reakciularo. Ĝiaj produktaĵoj konsistas el pli ol cent specoj, kiaj lana teksaĵo, lana miksteksado, altklasa poliestera miksteksado, lana litkovrilo kaj lana fadeno, kaj ĝia jara produktokvanto altiĝis dudekoble pli ol tiu antaŭ la Liberiĝo. Inter tiuj produktaĵoj multaj havas sian merkaton en fremdaj landoj kaj estas bonvenaj al la konsumantoj.

Kun la impeta disvolviĝo de la fabriko, paŝon post paŝo leviĝis la politika kaj ekonomia pozicio de ni laboristinoj. Pro la turmentado de la malnova socio, mi estas malforta kaj suferas de multaj malsanoj, kaj pro tio niaj gvidantoj de la fabriko sendis min al sanatorio. Iufoje kiam mi suferis de nefrito, la fabriko sendis min en hospitalon kaj ĉiujn kuracajn elspezojn pagis la ŝtato. Krome, mi ricevis mian salajron kiel kutime. Kiam laboristinoj naskas infanon, laŭ reguloj difinitaj de la ŝtato ili ricevas forpermeson de 56 tagoj. La fabriko havas infanvartejon kun pli ol 600 infanoj kaj la patrinoj havas sufiĉan tempon por mamnutri sian infanon dum deĵoro. Pro ĉio ĉi tio mi estas elkore danka al la savanto Prezidanto Maŭ! Nur dank' al saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio ni laboranta popolo povas havi la nunajn feliĉajn tagojn.

Post hardado en la Granda Proletara Kultura Revolucio, nun pli leviĝis la klasa konscio de ni laboristinoj kaj ni vere fariĝis mastroj en politiko kaj tekniko. La kvanto de kadrinoj okupas proksimume duonon de la gvidantaj membroj de diversnivelaĵaj partiaj organizoj de nia fabriko. Prenu Ĝang Hiujong, kiu foje laboris kune kun mi, kiel ekzemplon: en la malnova socio ŝi estis malriĉa knabino, sed nun ŝi jam estas membro de la Partia

Komitato de nia fabriko kaj estis elektita kiel reprezentanto por partopreni nacifestan revuadon en Pekino kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Laboristino Ju Gujlan nun estas vicestro de la Provinca Revolucia Komitato de Liaŭning. Ankaŭ ni ordinaraj laboristinoj nun partoprenas en projektado kaj teknika renovigo kaj, same kiel laboristoj, kreis multajn novajn ekipaĵojn, novajn produktaĵojn kaj novajn teknologiojn dank' al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso. Ekzemple, post la renovigo de la teknologio, la rapideco de tinkturado de miksteksaĵoj de viskozaj kaj poliamidaj fibroj plialtiĝis naŭoble. Antaŭe por tinkturi unu rulaĵon da teksaĵo oni bezonis unu horon, sed nun nur ses minutojn!

Komparante la pasintecon kun la hodiaŭo mi sentas, ke la bonfaro de Prezidanto Maŭ estas profunda por ni kiel maro. En la pasinta aŭtuno la progresema brita verkistino Hansujin vizitis nian fabrikon. Ŝi propraokule vidis la gigantan ŝanĝiĝon de la pozicio de la ĉinaj laboristinoj post la Liberiĝo. Kun profunda kortuŝiĝo ŝi diris: "Nur en la nova Ĉinio gvidata de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de laboristinoj povas havi tiel altan politikan pozicion, kaj tre feliĉaj estas la ĉinaj virinoj vivantaj en la epoko de Maŭ Zedong!"



*Liu Lianzi (maldekstre) instruas teknikon al juna laboristino.*



# Vizito al Ĉasistoj

**E**N frua somero ni vizitis ĉas-punkton de Giaŭding-monto de Ŝangŝenŝu-komunumo en la Malgranda Hing-an-montaro, Hejlonggiang-provinco.

La ĉas-punkto situas pli ol 20 kilometrojn fore de la komunuma sidejo. Ni trapasis arbetarojn kaj riveretojn, iradis en altaj montoj. Prezentigis antaŭ ni jen maro da sveltaj betuloj, jen vasta zono da nigre verdaj ruĝpinoj. Alproksimiĝante al iu montpinto, ni vidis, ke leviĝas super veproj kolono da fumo. Ni rigardis pli atente kaj vidis domon sinkaŝantan inter veproj.

Ni enpaŝis la domon kaj estis tuj infektitaj de revolucia etoso. Ĉe la helaj vitraj fenestroj kuŝis *Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong* kaj *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, sur la muro pendis la brila portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj sloganoj **“Altigu singardemon kaj defendu la patrolandon”** k. a. Kelkaj junaj ĉasistoj sidis ronde kaj faris bestokaptilojn. Kvankam ĵus komenciĝis somero, tamen ili jam faris preparon por la ĉassezono post aŭtuno.

Sciiginte pri la celo de nia vizito, komunisto Liu Hiangguj, maljuna ĉasisto kun la aĝo de pli ol 50 jaroj, ekrakontis emociite: “En la malnova socio, ni ĉasistoj vivis plej malfeliĉe. Riĉuloj kaj potenculoj nomis nin ‘montaj hundoj’. En tiuj tagoj, bienuloj, tiranoj, spionoj, ĝendarmoj, naciperfiduloj kaj banditoj ĉie prirabadis kaj ofte batis kaj kaptis ĉasistojn. La tuta posedaĵo de ĉiu familio de ni ĉasistoj estis nur peco da kapreola felo. Ni loĝis tutajn jarojn en malluma kelo kaj multaj homoj mortis en ĝi. Post la Liberiĝo ni ĉasistoj fariĝis mastroj de la ŝtato kaj ricevas senkomparan prizorgon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. En la pasinta jaro, kamarado Hiaŭ Keming, estro de la revolucia komitato de nia ĉas-brigado ĉeestis en Pekino la solenadon de la 20-a datreveno de la nacia festo kaj vidis nian grandan gvidanton Prezidanto Maŭ. Tio estas la plej granda feliĉo por ni ĉasistoj!”

Parolante pri la zorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la feliĉa vivo en la socialisma patrio,

la maljunulo ne povis reteni sian emociiĝon kaj daŭre rakontis al ni la tieajn ŝanĝiĝojn. La ĉasistoj starigis la penson ĉasi por la revolucio kaj senĉese plibonigas metodojn en ĉasado por kapti por la ŝtato pli da raraj bestoj. Antaŭe ili ĉasis cervojn per pafilo aŭ lazo, tial la kaptitaj ofte estis mortaj. Nun ili fosis enfalujojn kaj kaptis bestojn vivaj por ilin bredi. Krom ĉasado la ĉasistoj ankaŭ ekspluatas virgan teron. Ĉirkaŭ la domo ili kultivis grenon kaj legomojn. Plej frue semitaj tritiko kaj ŝenoprazo jam verdetiĝis kaj ankaŭ spinaco, aromcepo kaj terpomo baldaŭ ĝermos. Tiamaniere, ili jam povas sufiĉe provizi sin per memproduktitaj greno kaj legomoj.

Dum la tagmanĝo regis vigla atmosfero. Ni manĝis aŭskultante radiodissendon. Maljunaj kaj junaj ĉasistoj gaje parolis pri la gravaj kurantaj aferoj en- kaj ekster-landaj. Kamarado Liu Hiangguj aŭskultis la radiodisaŭdigon precipe atente kaj poste li gvidis ĉiujn lerni kaj diskuti pri la aŭskultitaj gravaj novaĵoj.

Maŭzedongpenso nutras la ĉasistojn en la profundaj montoj. La maljuna generacio havas altan ambicion kaj la juna generacio kreskas sane. Foje, Li Gintang, milica vic-plotonestro kun la aĝo de pli ol 20 jaroj, rimarkis spurojn de apro sur neĝo kaj tuj sola sekvis ilin kun ĉashundoj. Sed sur la vojo li renkontis grandan nigran urson. Ĝi estis gardanta alian nigran urson de ĝi mordmortigita. Li Gintang decidis mortigi la malutilan rabobeston por la popolo. Li senhezite pafis kontraŭ la urso kaj trafis ĝin je la frunto. Sed la besto ne falis kaj sin ĵetis al li. Ĝi per du saltoj alproksimiĝis je 4-5 metroj. Li Gintang trafis ĝin per sinsekvaj du kugloj, sed la urso ankoraŭ ne falis kaj saltis antaŭen ĝis kelkaj metroj fore de li. Dangero pendis super Li Gintang, sed li estis tute aplomba kaj havis nenian timon. Kiam la urso sin starigis kaj estis preta sin ĵeti denove, Li Gintang trafis ĝin je la mortiga loko de la brusto per la kvara kuglo. La urso rondiris ĉirkaŭ malgranda arbo kaj falis. Ĝi pezis pli ol 400 kilogramojn.



# Estu Bonvenaj Vi, Kiuj Fiksloĝiĝos en Kamparo

**R**ESPONDE al la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, tra la tuta lando disvolviĝas inter urbaj loĝantoj la movado de iro al montregionoj kaj kamparo. Inter homoj tien irintaj estas kadroj, kiuj partoprenas fizikan laboron kaj lernas denove, intelektaj junuloj, kiuj akceptas redukon de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mez-kamaranoj, kaj ankaŭ loĝantoj en urboj kaj urbetoj.

Al tiuj kiuj venas al la kamparo por fiksloĝiĝi kaj partopreni kolektivan produktan laboron, la kadroj kaj komunumanoj en la vilaĝoj montras varman akcepton. La komunumanoj de Miaŭgie-brigado en la orienta antaŭurbo de Tiangin, kun la sama sento, bonvenigis la urbajn loĝantojn venantajn por fiksloĝiĝi ĉe ili. Kiam la kamparanoj aŭdis pri la novaĵo, ili tuj komunikis ĝin unu al alia por aktive cedi ĉambrojn kaj pretigi fornojn por loĝigi la novajn komunumanojn ĉe si.

En la 6-a produkta grupo, estis la maljuna malriĉkamarano onklo Han Kinggi, kiu la unua anoncis sin por cedi ĉambrojn. Kiam li

tion faris kaj rapide revenis hejmen, li ĝoje diris al sia bofilino: “Mi jam promesis cedi unu kaj duonon da ĉambroj, en kiuj mi loĝas. Mi anoncis la unua en nia grupo!”

“Vi forpromesis la tuton, kie vi mem loĝos, mia bopatro?” demandis la bofilino.

“Mi? Kie ajn. Ĉar ili aŭskultas la vorton de Prezidanto Maŭ kaj venos al ni volonte, ni devas laŭeble aranĝi bonan loĝejon por tiuj klasaj fratoj.”

“Ĉu ne estus pli preferinde cedi niajn okcidentajn ĉambrojn ol viajn nordajn ĉambrojn?” konsilis la bofilino.

“Por cedi, oni devas elekti la bonajn ĉambrojn. Ni devas agi kiel Ĝang Side kaj Bethune, servante al la popolo ‘**ekskluzive**’ kaj ‘**senrezerve**’, en spirito de ‘**kompleta sindono al aliaj sen ajna konsidero pri si mem**’. La tritika kampo de nia grupo sur la orienta deklivo bezonas akvumadon. Mi povas gardi ĝin dumtage kaj tranokti en la ĉambro por norio kaj samtempe prizorgi la instrumentojn, tio ebligas al la grupo ŝpari unu plenan laborforton.”

“Nun estas varme, kaj oni povas tranokti kie ajn. Kion fari, kiam venos vintro?” redemandis la bofilino.

“Se nun estas taŭge, ankaŭ estos taŭge en vintro. Antaŭe, kiam mi havis la aĝon kiel vi, mi ne havis ŝuojn sur miaj nudaj froste fenditaj piedoj kaj almozpetis surstrate en ĉifona nevatita vesto dum vintro. Kie estis mia hejmo! En la nokto, mi povis nur trovi ŝirmejon kontraŭ pluvo kaj vento sub tegmentorando de alies domo. Nur dank’ al Prezidanto Maŭ ni havas nun tiun lumplenan loĝejon kaj vivas feliĉe.”

Aŭskultinte la vortojn de la bopatro, la bofilino diris ĝoje: “Morgaŭ mi ordigos la ĉambrojn, por ke la venontaj urbanoj estu kontentaj!”

“Estos malfrue fari tion morgaŭ, ni komencu ĝin jam hodiaŭ vespere, por ke ĉio estu preta antaŭtempe.”

Eklumis la lampoj en la tri nordaj ĉambroj. La bopatro kaj la bofilino komencis la laboron, transportante objektojn kaj purigante la ĉambrojn.

Nun ĉiu ĉas-punkto estas batala kolektivo. Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ, ĉiuj punktoj disvolvis la revolucionan spiriton “**zorgi, ame protekti kaj helpi unu alian**”. Foje, iu ĉasisto estis mordita de urso. Por ekstermi la malutilan beston, la brigadestro tuj ekiris kun du ĉasistoj. Transgrimpinte montojn kaj travadinte riverojn, ili kuradis cent

kelkdek liojn en tri tagoj kaj noktoj, fine kuratingis la urson kaj ĝin mortigis.

Aŭskultinte la rakonton de ĉasistoj, ni profunde sentis, ke la sune brila Maŭzedongpenso lumigis la koron de la ĉasistoj. Ili diligente ĉasas por la revolucio en densa arbaro de profunda montaro.



# Amika Kunlaboro kaj Interrilato

## LA ĈINA SOCIETO DE RUĜA KRUCO SENDIS KONSOLAJN TELEGRAMOJN, MONAJN KAJ MATERIAJN HELPOJN AL POPOLOJ TRAFITAJ DE KATASTROFO

En la unua duono de la kuranta jaro, Somalio, Alĝerio, Cejlono, Maroko, Sudano, Rumanio, Hungario, Peruo kaj Jemeno trafis unu post alia inundon, senpluvecon aŭ tertremojn kaj suferis perdojn en mal-sama grado. La Ĉina Societo de Ruĝa Kruco sendis konsolajn telegramojn aŭ leterojn kaj donacis monon aŭ medikamentojn, rizon, tritikon, manĝaĵojn, lanajn litkovrilojn, vestojn kaj aliajn al la suferintoj respektive por helpi ilin venki malfacilojn kaj rekonstrui siajn hejmojn.

Cetere, laŭ la peto de la Palestina Ruĝkrescenta Societo, por subteni ĝian laboron de helpo al vunditaj gerilanoj kaj al la palestinaj rifuĝintoj, je la fino de

la lasta jaro, la Ĉina Societo de Ruĝa Kruco donacis al ĝi kuracajn instrumentojn, medikamentojn, ambulancojn, vestojn, ŝuojn, kudromaŝinojn, lanajn litkovrilojn kaj aliajn. Antaŭ nelonge, tiuj materialoj jam atingis la havenon Akaba.


La prezidanto de la Palestina Ruĝkrescenta Societo d-ro Mahmoud Hijazi kaj ĝia respondeculo d-ro Fathi Arafat skribis dankan leteron al la ĉina popolo kaj la Ĉina Societo de Ruĝa Kruco pro la subteno. En la letero ili diris: “La ĉina kaj palestina popoloj havas multajn komunajn punktojn, niaj du popoloj ambaŭ spertis malfeliĉon kaŭzitan de la sama armita forto — la usona imperiismo.” “En la nomo de la palestina popolo, ni dankas al vi pro la subteno al nia justa afero en opono kontraŭ la imperiismo kaj cionismo.”

## LA UBUNGA AGRIKULTURILA FABRIKO FIN- KONSTRUIĜIS EN TANZANIO SUB ĈINA HELPO

Je la 5-a de junio, Rashidi Mfaume Kawawa, la dua vicprezidanto de Tanzanio, prezidis la finkonstruiĝan ceremonion de la Ubunga Agrikulturila Fabriko — la unua agrikulturila fabriko de Tanzanio.

Tiu fabriko estas konstruita per helpo de Ĉinio, laŭ la protokolo de interkonsento pri ekonomia kaj teknika kunlaboro subskribita inter la registaroj de Ĉinio kaj Tanzanio je la 5-a de januaro 1965. La

*Ĉina teknika laboranto instruas teknikon al laboristo de iu ŝpinteksa kaj tinktura fabriko de Afganio.*



konstruo de tiu fabriko komenciĝis de februaro 1968 kaj sukcese kompletigis je marto de la kuranta jaro.

La industria kaj komerca ministro de Tanzanio Abdul Babu kaj ĉina ambasadoro al Tanzanio Ĝong Hidong subskribis en la nomo de sia propra registaro je la 4-a de junio sur oficiala dokumento pri transdono de la Ubunga Agrikulturila Fabriko de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko al la Registaro de la Unuiĝa Respubliko de Tanzanio.

*Membroj de la Ĉina Kuraca Taĉmento instruas higienan scion al gvineaj popolanoj.*



*Ĉinaj agronomoj instruas teknikon al agrikulturaj laboristoj de Kongolando (B).*

Dua Vicprezidanto Kawawa kaj Ĉina Ambasadoro Ĝong Hidong faris paroladojn en la ceremonio. Ili entuziasme laŭdis la senĉese disvolviĝantan amikecon inter Tanzanio kaj Ĉinio.

### **ELEKTROENERGIA KONSTRUO KOMPLETIGITA EN GVINEO SUB ĈINA HELPO**

Ceremonio pri kompletigo de konstruo de transmisio kaj distribuo de elektro inter urboj sub ĉina helpo okazis je la 16-a de majo en Mamou en la meza parto de Gvineo.

Tiu konstruo estas kompletigita per la komuna klopodo de la ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj kaj gvineaj laboristoj sub la zorgo de la gvinea registaro. Ĝi transmisiis elektron de la Kinkon-a Hidroelektra Stacio, konstruita per ĉina helpo, al Labe, Pita, Dalaba kaj Mamou sur la altebenejo en la meza parto de Gvineo por kontentigi la elektrajn bezonojn de industrio kaj loĝantaro de tiuj urboj.

Barri Sory, respondeculo de la gvinea Ĝenerala Elektroenergia Buroo faris paroladon en la ceremonio. Li entuziasme laŭdis la amikan kaj kunlaboran rilaton inter Gvineo kaj Ĉinio kaj dankis al Ĉinio, ke ĝi donis al Gvineo tre efikan kaj senegoisman helpon en la sincera kaj frata kunlaboro.

Barri Sory voĉlegis ĉe la ceremonio ordonon de Prezidanto Sekou Toure pri dono de honora medalo de laboro al ĉina teknikisto Jang Ŝengkun, kiu oferis sian vivon pro ofico en konstruo de la elektroenergia reto ĉe la meza Gvineo. En la nomo de la gvinea registaro, Diane Lansana, ministro de socialaj aferoj donis la medalon al Du Hing-juan, estro de la Delegacio de la Ĉina Registaro.



坚决 反对 日本 軍国主义  
 Jiānjué Fǎnduì Riběn Jūnguózhǔyì  
 (firme oponi Japanio militarismo)

**Firme Oponi Kontraŭ la Japana Militarismo**

一九三七年<sup>1</sup>，日本 軍国主义 发动了 全面 侵华<sup>2</sup>  
 Yījiūsānqī-nián, Riběn jūnguózhǔyì fādǒngle quánmiàn qīn-Huá  
 (1937 jaro Japanio militarismo lanĉi plenampla aksi agresi Ĉinio  
 En 1937, la japana militarismo lanĉis plenamplaksan agresan militon kontraŭ Ĉinion.

战争。但是 中国 人民，在 中国 共产党 领导下，  
 zhànzhēng. Dànshì Zhōngguó rénmin, zài Zhōngguó Gòngchǎndǎng lǐngdǎo xià,  
 milito sed Ĉinio popolo je Ĉinio komunista partio gvidi sube  
 Sed, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo fine venkis ĝin

经过 八年 抗战，终于 打败了 它。现在 日本 反动  
 jīngguò bā-nián kàngzhàn, zhōngyú dǎbàile tā. Xiànzài Riběn fǎndòng  
 trapasi ok jaro rezistmilito fine venki ĝi nun Japanio reakcia  
 post okjara rezista milito. Nun, sub la apogo de la

政府，在 美<sup>3</sup>帝国主义的 扶持 下，正在 加紧 复活  
 zhèngfǔ, zài Měi-dìguózhǔyì de fúchí xià, zhèngzài jiājīn fùhuó  
 registaro je Usono imperiismo de apogi sube esti -anta intense revivigi  
 usona imperiismo, la japana reakcia registaro estas intense reviviganta militarismon, por fari

軍国主义，准备 向 亚洲 各国 进行 侵略 和 扩张。  
 jūnguózhǔyì, zhǔnbèi xiàng Yàzhōu gè guó jìnxíng qīnlüè hé kuōzhāng.  
 militarismo prepari kontraŭ Azio diversa lando fari agresi kaj ekspansii  
 agreson kaj ekspansion kontraŭ la diversaj landoj de Azio.

中国 人民 坚决 同 日本 和 亚洲 各国 人民 团结  
 Zhōngguó rénmin jiānjué tóng Riběn hé Yàzhōu gè guó rénmin tuánjié  
 Ĉinio popolo firme kun Japanio kaj Azio diversa lando popolo unuigi  
 La ĉina popolo firme unuigos kun la japana kaj diverslandaj popoloj de Azio por ĝisfunde frakasi

起来，彻底 粉碎 它的 侵略 野心。  
 qǐlai, chèdǐ fěnsuì tāde qīnlüè yěxīn.  
 ek- ĝisfunde frakasi ĝia agresi ambicio)  
 ĝian agresan ambicion.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografioj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. 一九三七年 signifas: "unu mil naŭcent tridek sepa jaro". Oni ellasas kutime la vortojn 第 (-a), 千 (mil), 百 (cent) kaj 十 (dek).
2. 华 estas mallongigo de 中华 Zhōnghuá, kiu estas sinonimo de Ĉinio.
3. 美 estas mallongigo de 美国 (Usono).

# La Patriotaj Armitaj Fortoj kaj Popoloj de Suda Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo Ekstermis 132,000 Malamikojn en Du Monatoj

**L**A popoloj de la tri landoj de Hinduĉinio akiris brilajn venkojn unun post alia en la batalo kontraŭ la usonaj agresantoj kaj iliaj lakeoj.

Laŭ statistikoj de la Sudvjetnama Novaĵ-agentejo Giaí Phong, Novaĵ-agentejo Pathet-lao kaj la Informa Buroo de la Nacia Unueca Fronto de Kampuĉa, en la du monatoj de la fino de marto ĝis la fino de majo de la kuranta jaro la patriotaj armitaj fortoj kaj popoloj de suda Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo ekstermis kaj kaptis 132,000 malamikojn (inter kiuj estis 30,000 usonaj agresantoj), inkluzive ekstermitajn kaj grave vunditajn du brigadojn kaj

preskaŭ cent batalionojn de la malamiko, faligis kaj detruis pli ol 1,000 malamikajn aeroplanojn, detruis pli ol 3,000 malamikajn militajn veturilojn inter kiuj pli ol duono estis tankoj kaj kirasaŭtoj, forbruligis pli ol 50,000,000 litrojn da benzino kaj kelkdek mil tunojn da municio kaj militaj materialoj de la malamiko.

## SUDA VJETNAMIO

De la fino de marto ĝis la fino de majo, ĉijare, la sudvjetnamaj trupoj kaj popolo atakis pli ol 2,000 gravajn malamikajn bazojn kaj apogpunktojn,

*Batalantoj de la Sudvjetnama Liberiga Armeo persekutas usonajn marajn infanterianojn.*





ekstermis kaj kaptis pli ol 88,000 malamikojn inkluzive de pli ol 26,000 usonaj agresantoj kaj soldatoj de vasalaj trupoj, ekstermis kaj grave vundis 41 batalionojn kaj trupojn egalajn al batalionoj, ruinigis pli ol 50 malamikajn komandejojn de la nivelo super bataliono, mortigis kaj vundis kvar usonajn oficirojn kun rango de kolonelo, majoro-generalo kaj leŭtenanto-generalo. La sudvjetnamaj popolaj liberigaj armitaj fortoj faligis kaj detruis pli ol 900 malamikajn aeroplanojn, frakasis kaj difektis 2,000 malamikajn militajn veturilojn (inkluzive pli ol 1,100 tankojn kaj kirasaŭtojn), forbruligis pli ol 20 gravajn staplejojn de la usona kaj pupa armeoj, forbruligis pli ol 50,000,000 litrojn da benzino kaj kelkmil tunojn da municio.

La sudvjetnamaj armitaj fortoj kaj popolo donis pezan baton al la "paciga" plano de la malamiko kaj pli ol duono de la "strategiaj vilaĝoj" starigitaj de la malamiko en suda Vjetnamio jam estas detruitaj.

La armeo kaj popolo de norda Vjetnamio tenas altan gardemon kaj estas ĉiam pretaj doni pezan

baton al agresantoj. En majo de la kuranta jaro, ili faligis 13 usonajn aeroplanojn kiuj entrudiĝis en la provincojn Nghe An, Quang Binh kaj la regionon Vinh Linh kaj tie faris senbridan bombadon.

## LAOSO

Disvolvante la venkon akiritan en atako dum la seka sezono de 1969 ĝis 1970, precipe tiun de repreno de la ebenejo Jars kaj la regiono Xieng Khoang, la laosaj armitaj fortoj kaj popolo frakasis multfojajn "balaadojn" de la malamiko kaj rabistajn atakojn de la usona aera armeo, likvidis la restaĵojn de banditoj en iuj liberigitaj regionoj, faris drastan atakon kontraŭ Sam Thong — Long Cheng, la nesto de banditoj de Vang Pao, liberigis Attopeu kaj Saravane, la gravajn urbojn de malsupra Laoso, kaj tiamaniere plivastigis liberigitajn regionojn kaj kunigis tiujn en supra kaj malsupra Laoso.

En aprilo kaj majo, la patriotaj armeo kaj popolo de Laoso ekstermis proksimume 4,700 malamikojn kaj militakiris multe da armiloj kaj aliaj militaj materialoj.

*Aviadilo F-4 H de la usonaj agresantoj faligita de milicanoj de la laosa liberigita regiono per fusiloj.*



## KAMBOĜO

La batalo de la kamboĝa popolo kontraŭ la usonaj imperiismaj agresantoj kaj ilia lakea kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak akiris flugan disvolviĝon en ĉiuj flankoj. Dum la lastaj du monatoj sub la gvido de Ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk kaj la Nacia Unueca Fronto de Kampuča, la diversaj tavoloj de la khmera popolo plifortigis la unuiĝon, faris bravajn batalojn kune kun la Nacia Liberiga Armeo, maltimante malfacilojn kaj vivoferon, donis mortan baton al la reakcia reĝimo kaj armeo de la kliko de Lon Nol kaj Sirik Matak, kaj donis samtempe pezajn batojn al la usonaj agresantoj kaj saĝona pupa armeo entrudiĝintaj en Kamboĝon.

La Kamboĝa Naciliberiga Armeo kaj la popolo jam liberigis areon kun pli ol miliono da loĝantoj inkluzive kvar provincajn ĉefurbojn, 53 guberniajn urbojn kaj urbetojn kaj kelkcent vilaĝojn. Kelkdek mil oficiroj, soldatoj kaj policanoj de la reakcia reĝimo de Lon Nol kaj Sirik Matak forlasis la mal-

amikan vicaron kaj partoprenis la Kamboĝan Naciliberigan Armeon.

Senĉese kreskas la revoluciaj fortoj de la tri landoj de Hindaĉinio, la liberigitaj regionoj de la tri landoj plivastiĝas kaj fortiĝas tagon post tago, kaj aperis favora situacio de la batalo kontraŭ la komunaj malamikoj, la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj. Ju pli obstine la usonaj rabistoj intensigas kaj plivastigas la agresan militon, des pli multe da teruraj malvenkoj ili trafas.

La armitaj fortoj kaj popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo decidis daŭre marŝi antaŭen, disvolvi la akiritajn venkojn, firme plenumi la alvokojn elmetitajn en la Komuna Deklaracio de la Plej Alta Konferenco de la Hindaĉiniaj Popoloj, unuiĝi solide kaj unuanime, subteni kaj helpi unu alian, venki ĉiujn malfacilojn kaj elporti ĉiujn oferojn kaj batali en kompakta kunlaboro, por frakasi decideme ĉiujn maĥinaciojn de la usonaj rabistoj kaj iliaj lakeoj kaj gajni pli grandajn venkojn.

*Panikaj usonaj agresantoj en Kamboĝo*





# Heroaj Armeanoj kaj Popolanoj

## ĉe Somes

— Pri heroaĵoj de armeanoj kaj popolanoj en Satu Mare, Rumanio, en batalo kontraŭ inundo

**E**N majo multaj lokoj de Rumanio estis atakitaj de superakvego. La diligenta kaj brava rumana popolo trapasis severan provon kaj hardon en batalo kontraŭ tiu natura katastrofo. Ĝi luktis kontraŭ la superakvego kun alta patriotisma spirito kaj komponis triumfajn kantojn de revolucia heroismo unu post alia.

### LUKTO KONTRAŬ EKSTREME GRANDA INUNDO

La urbo Satu Mare troviĝanta en la nordokcidenta parto de Rumanio estas unu el la gubernioj tre serioze suferintaj la inundon. En la meza tagdeko de majo ĉi-jare, pro daŭra pluvego kaj degelo de grandakvanta neĝo sur montregionoj, kies akvo torentegis rekte malsupren, la riveroj de Rumanio ŝveliĝis super siaj bordoj, kaŭzante al la lando la plej grandan inundon konatan en ĝia historio. La rivero Somes, kiu trovas sian fonton en la okcidentaj Karpatoj en Rumanio kaj trakuras kvin guberniojn en nordokcidenta parto de la lando kun longo de 400 kilometroj, estas unu el la riveroj kies akvo grave inundis. Satu Mare situas sur la suda bordo de la meza parto de Somes. Ĝi estas malnova urbo kun 80,000 loĝantoj kaj pli ol dek gravaj fabrikoj kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas vasta fekunda kamparo.

En la 14-a de majo, la akvonivelo de Somes post kelktaga pluvego leviĝis de pli ol du metroj al 9.20 metroj multe superante la rekordan nivelon de 7.80 metroj, kiun atingis tiu rivero en 1918. La riverakvo breĉis kaj transpasis la digon kaj torentis al Satu Mare en rapideco de 14 kilometroj pohore. Ĉie kien la fluo venis, la loĝdomoj estis detruitaj, fabrikoj enakvigataj, fervojoj kaj ŝoseoj trarompitaj, la linioj de akvokondukilo, elektro kaj gaso serioze difektitaj, kaj vasta kamparo inundita. La bela urbo Satu Mare fariĝis maro en malpli ol du horoj

kaj la akvo profundis je pli ol du metroj en iuj lokoj de la urbo.

La armeanoj kaj popolanoj de la urbo, same kiel tiuj de aliaj lokoj en la lando, unuiĝis sub la gvido de la Partio kaj registaro de Rumanio kaj sentime disvolvis heroan kaj obstinan batalon kontraŭ la serioza natura katastrofo, sinapogante sur la propraj fortoj.

La oficiroj kaj soldatoj de la armitaj fortoj kaj membroj de la Patriotaj Armitaj Taĉmentoj tuj organizis sin en savtaĉmentojn kaj laboris sur la plejfronto de savbatalo. Laboristoj, kiuj jam revenis hejmen post deĵoro, rapidis returne al la fabrikoj por savi produktajn materialojn kaj plenumi aliajn taskojn. La loĝantoj reciproke helpis kaj savis sin. Ankaŭ la pasaĝeroj de trajno haltigita en Satu Mare aktive sin ĵetis en la batalon kontraŭ la inundo. Por savi la vivon kaj posedaĵon de la popolo, la armeanoj kaj popolanoj luktis daŭre spite al laciĝo kaj malsato, ne konsiderante personan sekurecon. Iuj maldormis dum kelkaj sinsekvaj tagnoktoj kaj eĉ forgesis preni manĝon. Iuj, kiuj ĵus estis savitaj el la akvego, tuj komencis savi aliajn. Multaj lasis aliajn unue surŝipiĝi kaj mem restis ĝis la lasta ŝanco en kriza situacio, plene elmontrante la heroan temperamenton kaj noblan kvaliton de la rumana popolo.

### KIE ESTIS PLEJ GRANDA DANĜERO, TIE APERIS RUMANAJ ARMEANOJ

La oficiroj kaj soldatoj de la rumanaj armitaj fortoj, kiuj multfoje kontribuis en la afero de rezisto kontraŭ deekstera invado kaj de defendo de la patrolando, disvolvis sian gloran bataltradicion, ĉiam starante sur la plejfronto de batalo kontraŭ la akvego. En la unua tago, kiam la superakvego atakis Satu Mare, ili venis de la garnizonejoj en tiu



*La rumana popolo vaste levas amasan movadon por ripari perdojn alportitajn de la superakvego. Jen la popolo de la inundita urbo Gheorghe Gheorghiu-Dej estas rekonstruanta la urbon.*

ĉi kaj najbaraj gubernioj. Kie estis plej granda danĝero kaj plej malfacila tasko, tie ili aperis. Ili tagnokte direktis militajn aŭtojn, remis aŭ naĝis en la akvego por savi la popolanojn kaj ties havaĵon. Laŭ statistiko, dum la 72-hora luktado kontraŭ la superakvego, ili iris plenumi pli ol 3,000 savmisiojn kaj elsavis milojn kaj dekmilojn da homoj. En pli ol 250 savmisioj, ili transportis milojn da tunoj da diversaj materialoj al sekuraj lokoj. La loĝantoj de Satu Mare ne sciis iliajn nomojn, sed ili neniam forgesos la heroaĵojn kaj sinoferan spiriton de la popolaj armeanoj.

Danila, ŝoforo de amfibia milita aŭtomobilo, ripozis nur 13 horojn dum du semajnoj. La ceteran tempon li uzis por fari savlaborojn en Satu Mare kaj aliaj lokoj.

Savgrupo el kvar membroj de la fortoj de publika sekureco en la gubernio, kun varma amo al la patrolando kaj popolo, venis en la nokto de la 14-a al iu loĝkvartalo, kie ondis la plej rapida fluo. Kiam ili trovis ke en duetaĝa domo kolektiĝis granda nombro da virinoj, infanoj kaj maljunuloj, alvokantaj helpon, ili tuj remis al ĝi. Sed antaŭ la domo la strato jam fariĝis danĝera torentejo kaj la boato estis tuj deportita foren, kiam ili provis proksimiĝi al ĝi. Ili do ĉirkaŭiris al la dorso de la domo kaj poste naĝis en la domon por dorsporti aŭ teni brake unun post alia la helpopetantojn al

la boato. Por ke pli da personoj povu iri sur la boaton, ili mem naĝis en la profunda akvo, tirante aŭ puŝante la boaton. Iu oficiro nomata Dinu naĝis en la akvo tenante elektran torĉon en la buŝo por montri la vojon al boatoj kiuj veturis por savlaboro en mallumeco. Post ununokta senĉesa laboro la kvar herooj sukcesis savi el la akvego pli ol cent personojn.

Iu oficiro sieĝata de akvego en sia hejmo helpis ĉirkaŭajn loĝantojn koncentriĝi sur la supra etaĝo kaj helpis ilin suriri la boatojn, kiuj venis por ilin savi. Kiam oni petis lin mem suriri la boaton, li respondis: "Mi surboatiĝos nur kiam ĉiuj aliaj sekure forlasos ĉi-lokon. Tio estas mia devo kiel militisto!"

### **LERTULOJ EN PRODUKTO, BATALANTOJ EN SAVLABORO**

Kiuj batalis ŝultron ĉe ŝultro kun la popolaj armeanoj, estis membroj de la Patriotaj Armitaj Taĉmentoj. Ili estas grandparte laboristoj de diversaj fabrikoj, kiuj produktas dum ordinaraĵ tempoj kaj tuj povas ekpreni armilojn por defendi la patrolandon en okazo de neceso. En tiu batalo kontraŭ la superakvego, ili montris grandan batalforton. Iu traktoristo dum du tagoj kaj unu nokto elsavis pli ol tricent personojn el akvo pli ol unu metron profunda per sia traktoro kun trenĉaro. Iu lokomotiva teknikisto brave direktis trajnon kun



pli ol 3,500 pasaĝeroj al sekura loko, ĉe okazo de foresto de lokomotiva direktisto. Iu respondeculo kaj tri laborantoj de ŝtata agrikulturejo daŭre batalis 10 horojn kaj sukcesis eslavi 4,000 porkojn kaj aliajn materialojn, inter kiuj 600 porkidoj estis mane transportitaj al sekura loko.

Post la retiriĝo de la inundo, por kiel eble plej rapide restarigi la detruitan industrian kaj agrikulturan produktadon kaj normalan vivon, oni intense laboregis por forigi la postefikojn de la inundo sub la kondiĉoj de manko de trinkakvo kaj manĝaĵo. La fabrikaj oficistoj kaj laboristoj kaj registaraj funkciuloj ĉiutage laboris 10-12 horojn. En iuj damaĝitaj fabrikoj oni produktis tage kaj riparis la difektitajn maŝinojn nokte. La nedamaĝitaj fabrikoj klopodis pliprodukti por kovri la perdojn de la damaĝitaj fabrikoj. Multaj oficistoj kaj laboristoj, kies loĝdomoj estis damaĝitaj de la akvego, urĝe rapidis al fabrikoj post iom da necesaj aranĝoj en sia hejmo.


## HOMO SUPERAS LA NATURON

Dank' al daŭra batalado tagnokta, estis ĝenerale restarigita la normaleco de produkto kaj ĉiutaga vivo en Satu Mare en nur dek tagoj post la forfluo de la inundo. El 11 damaĝitaj fabrikoj 8 rekomen-

cis sian normalan produkton. Fervoja kaj ŝosea komuniko kun aliaj lokoj tuj estos komplete refunkciigata. Sufiĉa manĝaĵo estas provizata. Ĉiuj kiuj perdis sian loĝdomon, ricevis sian provizoran loĝejon.

La urbanoj de Satu Mare esprimis ke ili havas la decidemon kaj kredon venki la malfacilon provizore kaŭzitan de la inundo. Ili diris: Ĉar ni havas laboreman popolon, gvidon de la Partio kaj subtenon de frataj gubernioj kaj urboj, nia urbo rapide restarigos komplete sian normalan vivon kaj estos konstruita en urbon pli belan. Iu kadro de la gubernio diris: "La mondo estis kreita de laboro. Ĉion kreis homo. Kvankam la damaĝo de la inundo estas serioza, tamen, niaj manoj resanigos ĉiujn vundojn." Iu oficiro diris: "Malbonaĵo povas turni sin en bonan aferon. Ĉi-foje, nia armeo kvazaŭ faris batalon, en kiu ni ekzercis nin. La batalo kontraŭ la inundo montris ke nia armeo povas venki ĉiun malamikon."

La popolo de Satu Mare havas profundajn amikajn sentojn por la ĉina popolo. Ili unuvoĉe laŭdis kaj dankis la helpon donitan de Ĉinio al la kontraŭinunda batalo de la rumana popolo, konsiderante ĝin forta kuraĝigo al la lasta por venki la malfacilon.



*Post la inundo, la popolo de Mures de Rumanio tuj rekomencis produktadon por batalakiri novan rikolton.*

# Eksterordinaraj Atingoj de Albanio en Amasa Movado de Teknika Renovigo

Laŭ la instruoj de la Partio de Laboro kaj kamarado Enver Hoxha, la vastaj amasoj de albanaj laboristoj, inĝenieroj kaj teknikistoj persistante ĉe la orientilo de sinapogo sur la propraj fortoj kaj disvolvante altan revolucionan spiriton kaj la forton de kolektiva saĝo, vaste kaj profunde disvolvis amasan movadon de teknika renovigo, akiris eksterordinarajn atingojn kaj forte akcelis la socialisman konstruadon de la lando.

En la lastaj jaroj, la vastaj amasoj de laboristoj de la ĉefurbo Tiraneo konstruis multajn fabrikojn, laborejojn kaj produktliniojn sinapogante sur la propraj fortoj. En la jaro 1969 sola, 46 novaj laborejoj kaj produktlinioj jam estis konstruitaj, kaj multe da maŝinoj kaj novaj ekipaĵoj estis produktitaj. Kaj en la unua sezono de la kuranta jaro, 18 novaj produktlinioj estis konstruitaj. Krom tio, disvolvante la spiriton de komunisma kunlaboro ili helpis fabrikojn kaj entreprenojn de aliaj regionoj solvi multajn malfacilajn teknikajn problemojn.

Ekde la Tria Plena Sesio de la Kvina Centra Komitato de la Albana Partio de Laboro ĝis la unuaj kelkaj

*Albanaj kamparanoj ĝoje rikoltas tritikon.*



monatoj de la kuranta jaro, la vastaj amasoj de laboristoj kaj teknikistoj de Shkodra elmetis 7,866 raciigajn proponojn, el kiuj 6,570 estis adoptitaj. Kaj krome, ekspluatante siajn latentajn fortojn ili konstruis 81 novajn laborejojn kaj produktliniojn kaj starigis farunmuelejon, riz-muelejon kaj prilaborejon de terpomoj. En la lastaj du jaroj, dank' al kooperado inter fabrikoj kaj inter distriktoj ili kreis pli ol 100 specojn de novaj maŝinoj kaj ekipaĵoj.

Sole en la unuaj kvar monatoj de la kuranta jaro, disvolvante sian iniciatemon la vastaj amasoj de laboristoj de Vlora jam elmetis 525 raciigajn proponojn pli multe ol tiujn de la sama periodo de la lasta jaro, starigis 40 novajn laborejojn kaj produktliniojn, kaj produktis cent novajn maŝinojn kaj ekipaĵojn.


En la unuaj kvin monatoj sole de la kuranta jaro la petrolaj laboristoj de Patos-petrolregiono jam starigis 33 produktajn laborejojn kaj produktliniojn, kiuj jam komencis produktadon. Dank' al kunlaboro inter Patos-maŝinfabro kaj Stalin-urba Maŝinfabro multaj teknikaj malfaciloj estis solvitaj kaj multaj maŝinpecoj, kiujn oni devis importi antaŭe, estis produktitaj.

## Laboristoj de Koreio Sukcese Fabrikis 6,000-tunan Hidraŭlikan Premilon

Kun revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj laboristoj de Koreio sukcese fabrikis, antaŭenlonge, 6,000-tunan grandtipan hidraŭlikan premilon kaj ĝi jam komencis regule funkcii.

Dum la solena ceremonio okazigita de Kangsun-ŝtalfabro por celebri la sukcesan finkonstruon kaj funkciadon de la hidraŭlika premilo, estis donacitaj al modelaj laborantoj partoprenintaj tiun laboron





*Laboristoj de la albana Laminejo de Elbasan en laboro.*

honoraj atestiloj kaj premioj donitaj de kamarado Kim Il Sen, la ĉefministro de la Korea Kabineto, kaj voĉlegita la gratula letero de la Centra Komitato de la Labora Partio kaj Kabineto de Koreio al la tuta personaro de tiu laboro. En la kunveno la Konstanta Komitato de la Supera Popola Asembleo disdonis ordenojn al la modelaj laborantoj. Kamarado Kim Il, la unua vicĉefministro de la Korea Kabineto, inaŭguris la hidraŭlikan premilon por ĝia ekfunkciado. La sukcesa fabriko de la grandtipa hidraŭlika premilo estas nova atingiĝo en plenumo de la orientilo de mem-

stareco kaj sinapogo sur la propraj fortoj en la ekonomia konstruado. Ĝi montris rapidan disvolviĝon de pez-maŝina industrio de Koreio.

La hidraŭlika premilo estis ekfabrikita je la komenco de la jaro 1968. La laboristoj kaj teknikistoj de la ĉefaj fabrikoj respondecantaj pri ĝia konstruo, nome "Fabriko la 15-a de Junio" kaj Kangsun-ŝtalfabriko, disvolvante la spiriton de penema luktado, kooperado kaj batalado por venki malfacilojn, fine sukcesis fabrikii la hidraŭlikan premilon post penado en du jaroj.

## Prosperas la Liberigitaj Regionoj de Suda Vjetnamio

Post sia fondiĝo, la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio gvidas la popolon de suda Vjetnamio venke fari kontraŭusonan naci-savan militon, kaj samtempe kun tio gvidas ĝin vigle disvolvi la ekonomian kaj kulturan konstruadon kaj akiris grandegajn atingojn.

Dank' al persisto ĉe batalo unuflanke kaj ĉe produktado aliflanke, la kamparanoj de suda Vjetnamio

akiris riĉan rikolton de malfrue maturiĝanta rizo de 1969 — 1970.


La kamparanoj de la liberigitaj regionoj aliĝis unuj post aliaj al Kamparanaj Liberigitaj Ligoj. Ili aplikis en produkto la formojn de kolektiva produktado kiaj interhelpo kaj kooperado. En okcidenta Nam Bo, vastaj amasoj de kamparanoj vastigis sian rizkampa areon je 100,000 hektaroj kompare kun tiu de la antaŭa

jaro spite al la militaj cirkonstancoj. En multaj lokoj de la provincoj Ca Tho, Ca Mau, Soc Trang kaj aliaj oni akiris 4-5 tunojn da rizo pohektare, kaj eĉ 6-8 tunojn en iuj lokoj. En meza Nam Bo, la totala produktkvanto de malfrue maturiganta rizo estis ĉ. 20% pli alta ol tiu de 1968.

La revolucia registaro multe atentis pri disvolvo de eduka afero en la liberigitaj regionoj. Pli ol 6,000 elementaj kaj mezaj lernejoj estas dislokitaj en la ebenejoj kaj montregionoj, kiuj entenas centmilojn da lernantoj. Multaj lokoj de la provincoj Ben Tre, My Tho, Long An kaj Ca Mau, la nombro de lernantoj de la lernojaro 1969 — 1970 pliiĝis 1.5- ĝis 2.5-oble ol tiu de la lernojaro 1968 — 1969.


Por protekti la popolan sanon de la liberigitaj regionoj, la revolucia registaro starigis kuracejojn centrajn, provincajn, distriktajn kaj vilaĝajn. La higienaj institucioj de ĉiuj provincoj konstante sendas rondirajn urĝhelpajn grupojn kaj kuracistojn al la vilaĝoj por servi al la popolo. La medicinaj institucioj meminciate faras diversajn medikamentojn por kuraci diversajn malsanojn de lokaj popolanoj.

Sub la zorgo de la revolucia registaro, ankaŭ la kultura afero de la liberigitaj regionoj multe disvolviĝis. Multaj lokoj eldonis ĵurnalojn. Multaj provincoj kaj regionoj fondis kinajn trupojn kaj ensemblojn por servi al la popolamasoj de la liberigitaj kaj gerilaj regionoj.



*Sinapogante sur propraj fortoj, koreaj laboristoj sukcese fabrikis 6,000-tunan hidraŭlikan premilon.*

*Laboristoj de la Hanoja Maŝin-fabriko de Vjetnamio subtenas la fronton per siaj grandkvantaj kaj altkvalitaj produktaĵoj por solide bati la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn.*







**LETERO DE ANGLA  
LEGANTO M. R.**

Mi devas unue esprimi nian ĝojon pro la sukcesa lanĉado de la unua ĉinokonstruita satelito. Mi aŭdis hieraŭ la gravegan novaĵkomunikon per Radio Pekino anglalingve. Ĝi estas progreso de Ĉinio ekde la fondiĝo de la Popola Respubliko kaj samtempe progreso en teknika kaj kultura kampo, kaj estas la plej granda okazo en la nuntempa mond-historio. Tamen, ĉi tie oni pensas preskaŭ neniam pri Ĉinio, ĉar ĝi troviĝas tre for de ni; mi pensas, ke estas ekskuanta fakto, ke ĉina satelito, produkto de la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĉirkaŭiras super nia lando.

**LETERO DE AŬSTRA  
LEGANTO H. J.**

Vian eksterordinare interesan informon pri la lanĉo de la unua satelito de la Popola Ĉinio sub la gvido de via granda **PREZIDANTO MAŬ ZEDONG** ni danke ricevis. Tiu vere treege impona progreso profunde surprizas kaj impresas la tutan mondon.

**LETERO DE NEDERLANDA  
LEGANTO E. J. W.**

Ĉiumonate mi ricevas vian revuon. Vidante ĝin, mi ĉiam ĝojas pri la bona aspekto kaj presado, pri la belaj bildoj, sed precipe mi ĝojas pri la fakto, ke vi en Ĉinio eldonas tian revuon en la Internacia Lingvo Esperanto.

El la grandaj kaj potencaj ŝtatoj de la mondo estas nur via Ĉinio, kiu tiel favoras kaj subtenas la uzon de kaj la informadon pri la

Internacia Lingvo. Pro tio viaj Prezidanto Maŭ kaj registaro meritas dankon de ĉiuj bonvolaj homoj.

Gratulon pro la sukceso de via satelito, kaj homoj povas ĝin renkonti ie ajn sur nia terglobo post nur malmultaj horoj. Estas necese, ke estu pli da kontakto inter la enloĝantoj de la diversaj landoj. Aliaj grandaj ŝtatoj klopodas en internaciaj kontaktoj altrudi sian lingvon al la enloĝantoj de malpli grandaj kaj malpli potencaj ŝtatoj. Nur pri Ĉinio mi neniam aŭdis tion.

**LETERO DE DANLANDA  
LEGANTO F. P.**

Dankon pro la alsendo de la disko "Tri Popularaj Artikoloj", kiujn mi hodiaŭ ricevis en bona ordo. Precipe la artikolo "Montotranslokigo fare de Malsaĝa Avo" estas inspira, ĉar ĝi instruas sen laciĝo labori por siaj ĝustaj opinioj, ne timante objektivajn malhelpojn kaj oportunisman kritikon.



**NOVA TEKNOLOGIO DE TRANSLOKIGO  
DE ELEKTROTURO SEN ĈESIGO DE  
ULTRATENSIA KURENTO**

Disvolvante la revolucian spiriton kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la vastaj amasoj de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de la Elektropova Administracio de Ĉangĉun faris militiron al la "malpermesata regiono" de elektrotekniko, sukcese faris eksperimenton de translokigo de elektroturo en ultratensia linio de 154,000 voltoj sen ĉesigo de la kurento kaj elfaris difekto-sondilon por ultratensia linio de 154,000 voltoj, per kio ili faris kontribuon por la disvolviĝo de nia elektropova industrio.

En la pasinteco, por protekti bazojn de ferturoj de ultratensia elektrolinio de detruo

pro inundo, la Elektropova Administracio de Ĉangĉun devis elspezi dekmilojn da *yuan* por konstrui protektaĵojn al ili, kaj se la inundo estis tro serioza, oni devis translokigi la ferturojn al lokoj kie ili ne povis esti facile faligeblaj, por garantii sekuran transsendon de elektropovo. Laŭ fremdlanda regularo, oni nepre devis ĉesigi la kurenton por translokigi la ferturon, kio malhelpis la industrian kaj agrokulturan produkton.

Post sia fondiĝo, la revolucia komitato en la administracio gvidis la vastajn amasojn de laboristoj disvolvi la revolucian spiriton timi nek malfacilojn nek morton, serioze serĉi rimedojn en praktikado, kaj post pluraj eksperimentoj ili finfine sukcese kreis la novan metodon de translokigo de ferturo en 154,000-volta ultratensia linio sen ĉesigo de la kurento.

Post tiu venko, la laboristoj sukcesis fari difekto-sondilon por 154,000-volta ultratensia linio, post multaj eksperimentoj. Dank' al apliko de tiu sondilo, oni povas facile kaj rapide trovi difekton en la elektra linio, fari riparon ĝustatempe kaj garantii sekuran kaj bonan funkciadon de la elektra linio.

Dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj:

## BULGARIO

Petr Georgiev Takorev,  
vil. Zvezda, Distrikto Tigovište

## ĈSSR

Petr Ĉicvarak,  
Zemawova 429, Kutna Hora

Dadak Evaen,

Liuky nad/Olsi c. 575, okres  
Karvina i

Josef Lanar,

Sokolska - 18, Praha - II

Zdeněk Brychey,

U nadrazi 1/642, Havirov 3, okr.  
Karina

## DANLANDO

Henning Christensen,  
Bregentved alle 20, 2820 Gentofte

## JAPANIO

Hukunaga-isao,  
Japanio 838-Ol, Hukuoka-ken Mii-  
gun, Ogoori-maĉi Macuzaki

Jakejaki Mucuko,

466 Nagoja-ŝi Ŝoŭa-ku, Minami-  
jama-maĉi 14-4

### Korekto de N-ro 8 (145)

p. kol.	1.	anstataŭ	legu
8 maldek.	17	kiel	kial
14 "	8	Pro	Por
17 "	12	Katojama	Hatojama
18 "	7	spinoj	spionoj

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 9 (146) 1970

## Ĉefa Enhavo

Prezidanto Maŭ kaj Vicprezidanto Lin Intervidiĝis kun  
Ĉiuj Kamaradoj de la Delegacio de la Demokratia Popola  
Respubliko de Koreio

Eterne Vivu la Batala Amikeco inter la Ĉina kaj Korea  
Popoloj Formita el Sango

Kamboĝa Ŝtatestro Samdek Norodom Sihanuk Vizitis  
Koreion

La Vizito de Ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom  
Sihanuk al Vjetnamio (*bildserio*)

Kantoj kaj Dancoj de Unuiĝo kaj Batalo

Rapide Disvolviĝas la Industrioj de Metalurgio, Elektrono  
kaj Vitrofibro de Ĉinio

Teknika Renovigo en la Pekina Vinilona Fabriko

Tutkore kaj Tutanime Servi al la Popolo

Superba Himno al Popola Milito

Montanoj Lernas Filozofion

Abunda Rikolto de Somermaturaj Grenoj en Nia Lando  
Mi Estas Hardita en la Granda Proletara Kultura Revolcio  
"Tre Feliĉaj Estas la Ĉinaj Virinoj"

Vizito al Ĉasistoj

La Patriotaj Armitaj Fortoj kaj Popoloj de Suda Vjetnamio,  
Laoso kaj Kamboĝo Ekstermis 132,000 Malamikojn en  
Du Monatoj

Heroaj Armeanoj kaj Popolanoj ĉe Somes


### Sur la Kovrilo:

Su Juhua, biletvendistino de aŭtobuso de la linio n-ro  
14 en Pekino, kiu vive studas kaj vive aplikas la "tri  
popularajn artikolojn" kaj starigis en si la penson tutkore  
kaj tutanime servi al la popolo, laboras kun elstaraj  
atingoj sur la ordinara sed glora posteno. Jen ŝi varme  
helpas maljunan avinon ascendi la aŭtobuson.

### Sur la Dorskovrilo:

Angulo de la Fuhingmen-strato en Pekino





# Nova Fizionomio de la Industria Produkto

La Pekina Radio-aparata Fabriko produktis grandan nombron da transistoraj radio-riceviloj kaj radio-aparatoj por radio-ricevo kaj disaŭdigo kaj aliaj produktaĵoj taŭgaj por uzado en kamparo en aktiva servo al la laboranta popolo.


De la komenco de la kuranta jaro, la Luoĵang-a Traktora Fabriko ĉiunmonate superplenumis la produktan planon difinitan de la ŝtato kaj tiel faris novajn kontribuojn en subteno al la agrikultura produkto.






La revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Medikament-mekanika Fabriko faris amasan teknikan renovigon kaj nur en 14 tagoj sukcese provfabrikis nitrogen-hidrogenan kunpremilon kaj tiel forte subtenas nian industrian kaj agrikulturan produktadon.

La Juetan-a Fabriko de Duonkondukantaj Ekipaĵoj de Pekino sukcese provfabrikis en tri monatoj altfrekvencan epitaksan fornon urĝe bezonatan por nia elektrona industrio.







La Ŝanhaja Tria Pres-maŝina Fabriko sukcese provfabrikis 5-koloran intajlan rotacipresilon de nia lando.

Firme plenumante la grandan principon elmetitan de Prezidanto Maŭ **sinapogi sur propraj fortoj, peneme lukti en malfaciloj**, la Junnan-a Aŭto-akcesoraĵa Fabriko projektis kaj fabrikis per si mem kamionojn "Kunmin" taŭgajn por montaj regionoj en Junnan kun portkapablo de 4.5 tunoj kaj jam komencis produkti tion en granda kvanto.





立自主  
力更生